

Lingvo Internacia



Duonmonata gazeto

por

Esperanto

eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V^e

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

Poŝta kesto.

Al multaj. — Ni tre petas niajn korespondantojn, ke ili skribu **LEGEBLE EN ĈIU LETERO SIAN PLENAN NOMON KAJ ADRESON.**

ADRESARO DE KOMERCISTOJ akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpresado estas senpaga; ĉiu nova enpresado kosta 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn; por niaj abonantoj: 12 presoj 2 frankojn.

Paris, 33, rue Lacépède, — *Preso Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaĵoj.

St. Raŭni-Lesovje, Podolskaja gubern., (Ruslando), — *I. E. Moskovĉenko*. Mi rekomendas por aĉeti grenojn: tritiko, sekalo, hordeo por biero, aveno kaj cetera, kaj ankaŭ mielo, sukero.

Agde (Hérault), France. — *Fratoj Bucher*. Freŝaj vinoj kaj vinberoj el Sud-Franclando je l'makleroj. Rektaj sendoj el la bienoj en barelvagonoj aŭ en la bareloj de la aĉetintoj. Seriozaj reprezentantoj estas serĉataj.

Valence d'Agen (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

Wien (Aŭstrio), — *Gebrüder (Fratoj) Thonet*, specialaj artaj mebloj.

Pont-à-Vendin (P. d. C.) (France), Grande-Rue, — Presejo *Magniez*.



CH. JADEAU, Mercurey (S. & L.) Francujo, ĉiam respondos al ĉiuj Esperantistaj demandoj pri la vendado de ĉampana vino, de ŝaŭmanta vino de Bourgogne kaj de Saumur, kaj pri la neŝaŭmantaj vinoj.

S-ro **BENES O.** en **ZIZKOV**, Havliĉkova 29 (Bohemujo), kore salutas siajn korespondantojn. Li atentigas ilin pri sia nova adreso, kaj sciigas ke nun, pro manko de libera tempo, li ne deziras korespondi kun *novaj* eŭropaj samideanoj.

ESPERANTA HEJMO. Prof. agreg en la liceo, P-ro aprobata de Esperanto (kaj S-rino) povas ricevi en sian familion du kiom eble diverslandajn junulojn. Plena instruado pri ĉiuj lernindaĵoj. Esperanta kaj franca interparolado. Duployé'a steno-grafi Ŝakoj, piano. Modera prezo. Skribu al S-ro **MUFFANG** 19, rue du Fresne, Angers, France.

Gesinjoroj **MOINARD**, 27, strato Auber, *Alĝero*, deziras korespondadi kun fremdaj gesesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj. Tuj kaj ĉiam respondos.

Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

I februaro 1906

Marcel Finot : Konsideroj pri la monda sistemo (<i>fino</i>) .	65
Leon Kellner : Nerva familio (trad. ELLA SCHEERPELTZ) (<i>fino</i>)	70
François Coppée : Avinoj (tradukis D-ro PHILIPPET)	72
Miksaĵoj Kio estas banka bileto. — Hunda sagaceco. — Por la filatelitaro. — La sekreto de la turo de Glamis. — La ŝuoj de Voltaire.	74
D-ro J. Hanauer : La XIV-a internacia pacifista kongreso en Lucerno	76
P. Champion : Terkultura Kalendaro	79

Tra la mondo Esperantista

G. Grosset : La Proverboj en Esperanto	82
Movado Esperantista	83
Gazetaro Esperantista	90
Diversaĵoj	94

Nia aldono literatura (33—48 paĝoj) : **Mallumaĵoj**, de ABONYI ÁRPÁD (tradukis LENGYEL PÁL), *daŭrigo*.

Konsideroj pri la monda sistemo.

(Daŭrigo kaj fino.)

III

Sed tiun Teron mem, sur kiu ni loĝas kaj senĉese laboreme bataladas, ĉu ni vere ĝin konas? Ĉu ni povas imagi ĝian amplekson, ĝian formon?

Ni certe scias ke ĝi estas preskaŭ sferoforma, kaj ke la radeo de tiu ĉi sfero estas longa je 3600 km. Sed ĉu ni povas ĝin facile kompreni, kaj aliamaniere ol per numero montri ĝian dikecon kaj samatempe ĝian maldikecon? Legante tiujn ĉi rezultatojn, oni povas pri tio iom pripensi: 2000 pafilegoj, el kiuj ĉiu pafus 1000 fojojn ĉiusekunde kaj disjetitus 100 milionojn kilogramojn da tero, bezonus 1000 jarojn por eligi nian globon. Konstruante unu milionon da linioj da fervojoj, sur kiuj vojaĝus unu miliono da vagonaroj havanta ĉiu 1000 vagonojn, ŝargante ĉiun vagonon je

pezo de kirasîpo, forigante ĉiuhore tiujn ĉi vagonarojn, oni bezonus preskaŭ 5000 ĵarojn por eligi la Teron. Kaj oni miras, pensante ke tiu ĉi pezo, falante sur Sunon, produktus saman efikon, kiel akvero falanta sur eŭropan kontinenton. Tia estas Tero, polvo en spaco, malgrandega globo balancata en senlima etero kiel akvero en oceano. Kaj la homo, nevidebla estaĵo sur tiu ĉi nevidebla atomo, kredas ke li estas granda !

Tuŝante la formon de nia loĝejo, ni ne eĉ havas ĉiuj la samajn ideojn : oni longe kredis ke ĝi estas plata ; GALILEO elpensis tiun kuragan ideon, ke ĝi estas sfera, kaj ni tiel pensas. Sed hodiaŭ oni ne plu pri tio estas certa, kaj kelkaj scienculoj pretendas ke ĝi havas formon de kvarflanka piramido.

Tion ĉi precipe diras unu el la plej junaj kaj famaj francaj astronomiistoj, abato MOREUX, kiu eldonis gravan laboron pri la suna sistemo. Li provis montri, per la rilatoj inter sunaj makuloj kaj pluvoj teraj, per la temperaturo kaj precipe la rekomencoj de vulkana aktiveco sur la supraĵo de la globo, aŭ pli ĝuste de la planedo, ke la vorto « globo » estas eraro.

Efektive, laŭ la lerta astronomiisto, Tero ne estas sferforma, kiel oni diras en la lernejoj. Jen estas, kiel eble plej rapide, kiel S-ro MOREUX klarigas la piramidformecon de Tero, ne donante la eltrovon kiel sian, sed lasante la unuan gloron al iu LOWTHIAN GREEN, kaj bedaŭrante ke ĝi estas preskaŭ nekonata, malgraŭ ke ĝi estas mirinde simpla. Tero estus do simila je granda ovo, iom platigita ĉe tri flankoj kaj sube, kontraŭe je la pinto ; ĝi estas do proksimume kvarflanka piramido. La internaĵo estas plena je fandata materio, kies temperaturo estas pli alta ol 2000 °C, dum la krusto estas preskaŭ malvarma. Tiu ĉi krusto, kiu, laŭ ĉiuj geologistoj, estas dika je ĉirkaŭ 70 km., estas nur malgrandega membraneto, se oni ĝin komparas je la fajra maso kiun ĝi ĉirkaŭas, kaj tiu ĉi maldikeco mem kaŭzas nian sendanĝerecon. Kiam ĝi fariĝos pli dika, okazos ja eksplodoj tiel fortegaj, ke la nunaj vulkanaj elsputoj nur ŝajnas infanludoj. Tio ĉi jam de longe okazis sur nia satelito Luno, sur kies supraĵo la astronomaj lornoj elmontras grandan kvanton da krateroj diametraj je 100 aŭ 150 km.

Iam, dum la unuaj epokoj de la stela vivo, kiam Tero, unue nebulaĵo, iĝis iom post iom fajra, poste varmpasta, dikaj nuboj ĝin ĉirkaŭis ; nun tiel estas Jupitero. Poste, pro la centrifuga forto, ĝi iom platigis, dum la fortega frosto de

la spaco malfluidigis sur la supraĵo kruston pli kaj pli dikan. Tiu ĉi krusto unue estis tute densa, alligita al la pasta maso interna, sed ju pli la amplekso de tiu maso malgrandiĝis, des pli la ekstera krusto estis tro dika. Kaj tio kaŭzis fendojn kaj faldojn, kiuj estis unuaj malebenaĵoj de la supraĵo de Tero, kiu antaŭe estis tute glata. La naturo laboras laŭ precizaj leĝoj kaj nenion hazarde faras, nek montegojn, nek marojn, nek la ceteron, kaj S-ro LOWTHIAN GREEN montris, ke harmonia regulo gvidis la teran formadon.

Efektive, ĉiu sfero, sur kies supraĵo oni faras premon flankan iĝas regula piramido kvarflanka, kaj tiel estas Tero, dank' al la premo de la krusto, tro larĝa por la interna maso iom post iom malplilarĝiĝinta. Kiam oni rigardas terfiguraĵon, oni ekvidas ke oceanoj okupas tri flankojn regulajn unue la profundan kavajon de Pacifiko; due tiun de India Oceano; trie, tiun de Atlantiko. Tiuj grandegaj profundaĵoj, kiuj estas 10 kilometrojn profundaj, estas grandaj rompokaj platiĝo-ebenoj de la ŝelo. La kvara flanko de la piramido, kiu estas la fundamento, estas la Norda Poluso. De la vojaĝo de Nansen, neniu pli dubas ke tie ekzistas granda profundaĵo. La pinto de la piramido estas la Suda Poluso. kie, sur tute bone konata kontinento, esploristoj eltrovis tre altajn montegojn.

La anguloj de la piramido estas la jenaj la montoj Rokaj kaj iliaj daŭrigoj en Andoj; la altaj plataĵoj de Grønlando, Islando kaj Alpoj, de nordo al sudo de Eŭropo; la linio de montoj de Abisinio kaj Madagaskaro; fine la altaj supraĵoj de Tibeto, Malaisa insularo kaj ilia daŭrigo en Aŭstralio.

Tuŝante la vulkanojn, ĉiuj estas, diras S-ro MOREUX, sur grandaj rompoebenoj, kiel oni povas vidi kiam oni karton rigardas, kaj logike tial ke ili estas punktoj de plej malgranda rezisteco. La tuta okcidento de ambaŭ Amerikoj estas borderita de vulkana linio. La dua altaĵo konsistas el vulkanoj Islandaj, Italaj kaj Abisinaj. La tria donas vulkanojn de Javo kaj Japanlando, unuigitaj, per la vulkanoj de insuloj Aleŭtiaj, kun la rompolinioj de Rokaj montegoj. En la kontraŭa regiono oni trovas vulkanojn Erebon kaj Teruron, ĉiam agemajn. Fine la terkolo de Panamo, la profundaĵo de Antilioj, Saharlando, Mezamaro kaj Bengala golfo estas vulkanaj regionoj, kuŝantaj sur renkontejoj de profundaĵoj kaj de rompolinioj.

Ni ne volas ekzameni la tialojn sunajn, kiuj kaŭzas la elsputojn, sed ni sufiĉe pri tio diris por montri la trean strangecon de observoj kaj konkludoj de tiu ĉi bizara sistemo.

IV.

Je ĉiu epoko, dogmaroj, kosmogonioj, religioj, aŭ eĉ la simpla imago de la homaro profetadis finon de la mondo. Ja apokalipta teksto, diversmaniere komprenita de senteraruloj, ia parolo de scienculo, ia grandiganta brueto alveninta el nekonata loko, ofte konfuzis la popolon. Ĉar verŝajne ian tagon nia Tero estas mortonta, sed kiam, sed kiel? Kiu tion scios kaj diros?

Ĉiam la kometoj estis, en la historio de l' mondo, la plej granda terurigilo. Dum la mezepoko oni en ili vidis terurajn signojn, glavojn koloritajn je sango, hararojn de grandegaj bestoj korpmonstraj, kiuj facilan teruron disjetis dum tiuj ĉi centjaroj tra la superstiĉaj popoloj. ARAGO kaj LAPLACE ne pensis ke estos neebla ia renkonto de Tero kun ia kometo, kaj NEWTON sciigis ke en 2255-a, jaro, kometo ektuŝegos Sunon tiel forte ke tute okazos la fino de l' mondo, ĉar tiam la astro de la tago ne plu estos kapabla liveri necesan varmon kaj lumon al nia mondo. Kaj kiom da kometoj apud ni estas pasintaj, dum prokrasto de kelkaj horoj estus sufiĉinta por fine ĉion ekflamigi.

74 milionoj da kometoj, kies rapideco estas almenaŭ 150000 km. hore, (1000-obla rapideco de la plej rapida rapidvagonaro), eltirantaj kun si voston longan je kelkaj milionoj mejloj, kaj ampleksaj je pli ol 1000 milmilionoj km. (140 fojojn la diametro de Suno) trairas tra la suna sistemo. Ĉu oni ne povas supozi ke, kiel ĉevalo galopanta kiu ekfrapas ŝtonon kaj ĝin pulvorigas per fajreraro, ia kometo iam ektuŝegos nian malgrandegan globon kaj ĝin tutfine nenigos? Speciale, se la kometo de Biela (29 okt. 1832) estus prokrastinta je nur unu monato, nia globo estus perdita.

Se Tero renkontus kometon similan je tiu de 1899-a, maso nebula longa je 1,800,000 km. (2 fojojn volumo de Suno) la varmo produktota estus sama kvazaŭ oni jetus sur Teron fajran riveron dumilionfoje pli ampleksan ol nia planedo. Tiu terurega elpenso estas malmulte kredinda, kaj cetere el ĉiuj malfeliĉoj, kiuj minacas Teron, la kometo estas la malpli danĝera. Kiam Tero renkontas unu el tiuj ĉi vojaĝantaj astroj, el tio rezultas nur pluvo de steloj, kiu iluminas la spacon per mil kaj mil sulkoj forkurantaj kaj flamentaj.

Multe pli danĝera estas Suno, Luno kaj steloj, kiuj verŝajne estos kaŭzoj de la fino de Tero. Ni scias ke ekzistas mil kaj mil steloj, ke tiuj ĉi steloj estas sunoj kiuj movas sin

malproksime de ni, kaj terurrapidege. Iatage sendube unu el tiuj ĉi steloj eniros en la Sunan sistemon, kaj ne necese estos frapo, kaj tamen tio ĉi povos detrui nian planedon.

Estas ankaŭ ebla ke antaŭe ol frapiĝo okazos inter Suno kaj ia stelo, la centripetra forto, kiu tenas Teron sur ĝia orbito, ĉirkaŭ la suno, superos la centrifugan forton, kaj, post kelkaj milionoj jaroj, puŝos Teron al la centra sfero el kiu ĝi estis forpelita.

Antaŭ ol Tero estos detruiita per renkontiĝo kun Suno, frapiĝo inter nia planedo kaj Luno estos ankaŭ ebla. La astronomiistoj pruvis ke la altirado, kiun Luno faras, ĉiumomente, sur la flanko de Tero turnanta al ĝi, malpligrandigas iom post iom la forton de rivoluo de Tero ĉirkaŭ ĝia akso. Tiu ĉi altiro kaŭzas la marmovojn en oceanoj, kaj ankaŭ altiras la kontinentojn de Tero.

La influo de Luno, kiu kaŭzas marmovojn, prokrastas la rivoluon de Tero, ĉar tiu ĉi lasta turnas ĉirkaŭ ĝia akso 28 fojojn malpli rapide, ol Luno ĉirkaŭ la akso de Tero. Tiu ĉi influo reenagas kontraŭ Luno kaj devigas ĝin ke ĝi turnu ĉirkaŭ Tero en kreskanta heliko, anstataŭ en regula orbito. Luno malproksimiĝos de la Tero, ĝis kiam la influo de marmovoj estos plimalgrandiginta la daŭron de rivoluo de Tero ĉirkaŭ ĝia akso ; sed kiam Tero malpli rapide turnos, influo de luna marmovo plimalgrandiĝos, kaj ankaŭ la interspaco inter Tero kaj Luno, kaj Luno proksimiĝos al Tero, per heliko pli kaj pli malgranda, kaj fine Luno estos tiel proksima al Tero, ke ĝi Teron renkontos. Ĝi polverigos montojn kaj urbojn kaj aliformigos nin kaj nian substancon, en gason bruleblan.

Sed alimaniere ankaŭ povas fini mondo, kaj sendube ĝi tiel finos. Suno iom post iom malvarmiĝos kaj la vivo estos sur Tero pli kaj pli malfacila, ĉar la frostoj detruos ĉian vivulon. Tiu konkludo estas eĉ logika, ĉar ĝi pruvas la mortemon de Tero kaj samtempe tiun de nia nebulaĵo, t. e. de ĉiuj planedoj el kiuj konsistas la sama sistemo.

Scienculoj pripensis pri tiu ĉi afero kaj matematike ĝin antaŭvidis. Laŭ iliaj kalkuloj, dum ankoraŭ 3000 jaroj, la varmo suna taŭgos por homa vivo ; sed vere, en la fino de tiu ĉi tempo la frostoj, nune sidanta nur en polusaj regionoj, estos veninta tiel centren ke nur la tropikoj havos iom da varmo ; do en tropikajn terojn rifuĝos la lastaj loĝantoj de la sfero. Kaj, aldonas tiuj ĉi scienculoj, vidu kiel naturo bone agis : la kontinentoj eluziĝas en malvarmaj regionoj, disrompiĝas kaj polvere falas en oceanojn, dum, en varmaj landoj,

novaj kontinentoj eliras el tiu ĉi sama oceano ! La madreporoj estas kaŝitaj kaj mirindaj laboristoj kiuj daŭrigos la vivon de homo devigita rifuĝi en varman landon, kie, sen ili, la loĝeblaj teroj estus maloftaj.

Fine ni povos paroli pri alia fino, kiu konsenta estas kun iaj profetaĵoj, precipe kun Apokalipso ĝi estas la fina krevo, la eksputo de grandega vulkano, kies elsendaĵoj detruus verŝajne ĉiun vivon, kaj gasoj subite amasigitaj farus neverŝajnan eksplodon. Tio estas ebla fino, kaj oni nenion certan povas diri pri la dato de ĝia okazo.

Kaj kio estos la fino de Terò por la sennombra amaso de mondoj kiuj travojaĝas tra la Vastego ! ne eĉ okazajeto ! Nia malhumila globo estas punkto apenaŭ videbla nur de tre malmultaj steloj. Kiam nia fino estos okazinta, Universo daŭrigos brili per mil lumoj, kaj ne eĉ unu momenton okupos sin pri atomo perdita en senlima Vastego.

MARCEL FINOT.

NERVA FAMILIO

De LEON KELLNER

(Daŭrigo kaj fino.)

Kiamaniere mi konvinkigis, ke li ne estas maldiligenta ? tre simple ! Mi igis lin labori. Unue mi iris kun Emilo kune kun ankaŭ du knaboj al placo de « forhakita arbaro » por serĉi fragojn. Ĉiuj el ni portis ujeton kaj devis ĝin plenigi per tiu jam malofta frukto.

En unua duonhoro ĉiuj tri knaboj estis plenaj je fervoro ; ili rampadis, serĉadis unu pli ol alia. Post la dua duonhoro, Vien'ano, revenis, konkludinte, ke estas infane tiel klopodi por akiri kelke da beroj, kiujn oni povas aĉeti por malmulta mono, kaj post kelkaj minutoj venis lia frato, kiu rimarkis, ke ĉiuj beroj estas forŝiritaj. Post pli ol du horoj via Emilo alportis al ni sian ujeton plenigitan ĝis la rando.

Ne longe post tiu tago ni denove eliris kvarope por serĉi fungojn. Mi antaŭiris kaj montris al la knaboj la bonajn manĝeblajn kaj la venenon-enhavantajn fungojn ; tiam ili devis serĉi memstare.

Via Emilo estis la heroo de l'tago. Nur belegajn brunajn fungojn li alportis, kaj kian amason ! Kaj kien li estis enmetinta ilin ? Mi forgesis kunpreni oportunajn uje-tojn — mi eĉ ne supozis tian rikolton. La Vienaj knaboj alportis la kolektitajn maltaŭgajn venenaĵojn en siaj ... poŝtukoj. Emilo estis pretiginta por sia rikolto korbon el vergetoj kaj fortikaj kreskaĵetoj. Ĉu estas tiu knabo maldiligenta ?

Kaj kiel ĉarme sincera kaj konfidema estas tiu infano — jes, infano, spite al lia sesfuta alteco kaj muskoloj de atleto !

Sed mi timas, vi ne estas ankoraŭ kontentigita per mia rakontaĵo. « Ludi ne estas labori ! » tiel mi aŭdas vin paroli. Sciu, kara mia, tio ĉi estas tre malnova kaj tre eluzita re-
diro. Ni instruistoj scias tion pli bone kaj mi petas vin, kreu miajn vortojn : la ĝusta vera sukcesa laboro ĉiam estas ludo. Kion tio signifas ? Jen : nur tio, kion oni faras kun vera plezuro, el plej interna ĝoja deziro, nur tio estas bona, fruktoporta. Sed tian faradon oni neniam sentas kiel laboron, sed ĉiam nur kiel ludon. La abeloj neniel « laboras », ili ludas.

« Bone ! Mia filo do devas fariĝi kolektisto de fragoj kaj fungoj ? Kiel ? »

Vi estas ... advokato ! Via filo iam fariĝu tio, al kio lin kapabligas lia naturo, liaj emoj, — do homo, kiu laboras per siaj manoj kaj ne per la cerbo ; homo, kiu preferas freŝan aeron anstataŭ malvasta ĉambro, kiu prenas la mondon rekte el mano de Dio, t. e. per propraj sanaj kvin sentoj — anstataŭ studi karikaturon el diversaj presaĵoj. Faru el li kampariston, ĝardeniston, arbariston aŭ ian ajn iston, kiu per korpa laboro eluzas siajn fortojn — nur ne sendu lin lernejon, ĉar tiam li efektive ricevos' ĉiujn malsanojn pri kiuj vi nur konjektas, ke li havas ilin.

Mi scias, vi rifuzos mian konsilon, kiu estas resumo de jardaŭra observado, kaj tamen devigos vian knabon fini la studojn en meza-lernejo — sekve fari tion, kion faras miloj kaj miloj da knaboj, kiuj vivas en malpli bonaj cirkonstancoj ol la via ; sed vi pentos tion. Via filo estas — se tio vin ne timigas — nenormulo, praulo ; li estas hodiaŭ en dudeka jarcento precize tiel kapabligita, kiel estis la plimulto antaŭ centoj — kaj ĉiuj antaŭ miloj da jaroj. Li estas peco da nehumiligita naturhomaro inter fleksigintaj sklavo de kulturo. Vi povas lin disrompi, sed ne klinigi sub la jugon, kiun vi portas konvene kaj senpene.

Kaj la praktika, ordinara rezultato ?

Donu lin kiel lernanto al ekonomisto aŭ ĝardenisto kaj forpelu al diablo la antaŭjuĝon de via kasto kaj ankaŭ la pensadon pri eblaj socialaj sekvoj de via decido. Via filo — se ne venos kiel natura deziro la lernemeco (kio estas verŝajna) — kiel ordinara militisto servos la tri devigajn jarojn. Liaj lernejamikoj lin rigardos fiere de supre kaj eble lin tute evitos. Li eble neniam vivos kaj loĝos en maniero laŭ « leĝoj » de via rango ; ĉion tion vi devas timi. Sed via patro ankaŭ ne estis advokato, via avo estis eĉ malgranda metiisto, kaj vi estas honorata viro de altranga klaso. — Via filo do komencu de la komenco.

Kore vin salutas via fidela L. Kellner

A V I N O J

De François Coppée.

Finiĝas junio ; jen ĉiuj vilaĝoj senbrujaj !
 De longe minacas nubegoj teruraj, grizbluaj,
 Cu la fulmotondron, ĉu hajlon, ĉe la okcidento.
 Konsilas rapidan rikolton singarda prudento,
 Unue sur kampoj kaj poste sur la vinberejoj
 Jen pretaj falĉiloj ! Jen pretaj malplenaj garbejoj !
 Kaj ĉiuj kampanoj leviĝas tuj de l'tagreveno,
 Por fari kun ĝojo la feston brilegan de l'greno.
 Sed dume prizorgas la domojn l'avinoj bonvolaj
 Kaj antaŭ la pordoj sidiĝas, senmovaj kaj solaj.
 Sub suno karesa tremetas ilia mentono ;
 Kuniĝas kviete la manoj sur la lambastono,
 Car pro la laboroj kamparaj la dorso kurbiĝas,
 Kun siaj koltukoj, sur kiuj bataloj vidiĝas,
 L'avinoj plentagon restadas sur benko el ŝtono,
 Feliĉaj, kredeble senpensaj, nek vorton dirante,
 Kelkfoje trankvilan, misteran rideton farante
 Al l'astro, orbrilon metanta sur la sonoriloj
 Kaj ankaŭ oranta la spikojn falĉotajn de l'filoj . . .

La maljunulino tre ŝatas la tempojn somerajn,
 Eĉ kvankam lasinte la longajn restadojn vesperajn
 Kaj la ferakontojn, ĉe l'fajro, ĉar mortis la avo. —
 Griziĝu vi estos tutsolaj, sen amo, sen havo ! —
 Forestas filino por lavi ; bofilo kulturas ;
 Kaj tamen l'avin' forgesita neniam murmuras,
 Se l'suno nur al ŝi bonvolas varmigi la manojn ! . . .
 Al ili, pli junaj, tre plaĉis ludi l'infanojn,
 La koro de la grizulinoj kviete batadas,
 En niaj vilaĝoj, kaj ofte ĝi balanciĝadas
 Samforte, samtakte kun la balanciĝo lulila.
 Sed estas l'etuloj jam grandaj ; la kaĝo trankvila,
 Senbirda ; la buboj fariĝis fortikaj kampanoj.
 Ho ve ! al la blankharulinoj, — maljunaj infanoj, —
 Neniel plu restas ĉi tiu agrabla ludilo.
 Cu eble do ili ludadus per la radŝpinilo
 Volonte ? Jes, sed la okuloj pro l'aĝo laciĝis.
 La fingroj malgrasaj, ŝpinante fadenon tediĝis ;

Car per la manetoj, je tiel ehora blankeco,
 Kredeble l'avinoj jam ofte en simpla tolpeco,
 En neĝaj, ŝpinitaj de propra ŝpinilo, tolaĵoj,
 Envolvis la korpojn glaciajn de karaj estaĵoj . . .

Sed nek la ploriga, neniam ĉesanta malriĉo ;
 La morto rabanta la brutojn, nek la malfeliĉo
 De filo ironta militon, nek eĉ la malsatoj ;
 Nek la suferitaj senplende hazardaj ekbatoj ;
 Filin', servistino, el kiu nenia letero
 Plu venas ; nek la mil turmentoj sentitaj sur tero,
 Pri kiuj revadas l'avino kun morta ĉagreno ;
 La tondro ĉiela, per kiu elbrulis la greno ;
 Nek ĉio rememoriganta la tempon pasintan ;
 Nek la ĉirkaŭanta la turon preĝejan, altpintan
 Tombejo, en kiu blonduloj kunludas post lerno,
 En kiu mortintoj silentas por tuta eterno
 Kaj krucoj konataj najbaras la herbon sovaĝan.
 Nenio sukcesis elvenki l'animon kuraĝan.
 Kaj de nun, havante la aĝon ripozan, l'avino
 Nur ŝajnas deziri malmulton, je l'viva deklino.

Sufiĉas, ke ĉiam sidiĝu la maljunulino
 Sur sia ŝtonbenko, ĉe l'suno, sen limo, sen fino,
 Por tie kun miro rigardi sen fino, sen limo,
 La bluajn kaj verdajn anasojn pepantajn en ŝlimo ;
 Dum la lavistinoj babilas kaj lavas kun kantoj,
 Dum trinkas la plugoĉevaloj kun siaj rajdantoj.
 El ŝia infana rideto kaj frunto tremanta
 Radias naiva bonstato kaj paco konstanta.
 Vi kredus, ke ŝi nun forgesis la eksajn ĉagrenojn,
 Jam elpardonitajn, kaj ĉiujn oferojn kaj penojn.
 Sufiĉas nur al ŝi, estanta pli ol okdekjara,
 La simpla certiĝo pri morto en domo kampara.
 Sufiĉas nur al ŝi, por daŭra korgojo kaj sano,
 La suno, maljuna amiko de la kamparano.

Tradukis D-ro Philippet

(El Rondiranto *Trafluganta Stelo*)

MIKSAĴOJ

Kio estas banka bileto. — En multaj landoj, ekzemple en Francujo, Germanujo, k. a., la bankbiletoj aŭ banknotoj estas indiferece donataj aŭ akceptataj anstataŭ ormetala mono, kvankam ilia esenca valoro estas neniam. Sed pro la konfido de la publiko al la banko eldoninta ĝin, la noma valoro de la banknoto fariĝis tute egala kun la valoro de oro.

Tio ĉi okazis, ĉar oni scias, ke tia paperaĵo estas laŭvole ŝanĝebla por oro ; se tiu kondiĉo malaperus, la kredita valoro de bankbiletoj baldaŭ falus. Por tion eviti, la registaroj starigis leĝojn, laŭ tri malsamaj sistemoj.

Unua sistemo konsistas proporciigi la kvanton de rondirantaj biletoj kun la kvanto da metala mono sidanta en la kaso banka. Tion faris Anglujo. La Angluja Banko povas ja eldoni banknotojn nur ĝis sumo da 450 milionoj super la enkasa metala mono. Se la banko havas enkasajon da 2000 milionoj, ĝi povas rondirigi ĝis 2 450 000 000 ; se la enkasajo malgrandiĝas, tiam la rondirantaj biletoj devas proporcie esti malmultipligataj. Por pli facile certigi tiun sistemon, la Banko Angluja estas disduigita : unu departemento okupas sin pri la bankaj aferoj kaj povas eldoni nenian bileton ; la dua departemento konservas la enkasajon kaj liveras biletojn al la unua departemento, interŝanĝe por metalo. Tiu sistemo estas grava garantiaĵo por tiuj, kiuj posedas biletojn. Sed ĝi ne estas tre elasta. Se ekzemple la rondirantaj biletoj sume valoras 1950 milionojn, kaj se la enkasa metalo valoras 1500 milionojn, la Banko devas ĉesigi la diskontadon, ĉar ĝi ne povas eldoni novajn biletojn, nek ellasi metalan monon, kiu estas la leĝa garantiaĵo por la rondirantaj biletoj. Sed ĉesigi la diskontadon kaŭzus la ruinigon de multaj komercistoj en la mondo ! Tial estas necese en tia okazo paŭzigi la leĝan efikon kaj permesi al la Angluja Banko la preteriradon preter la limo. Tio okazis jam kelkajn fojojn.

Dua sistemo, uzata en Amerika Unuiĝo (Usono) konsistas devigi la eldonajn bankojn, ke ili garantiu la eldonitajn biletojn per seriozaj titoloj. En Ameriko la bankoj devas meti en la registaran Trezorejon titolojn da ŝtata rento je kvanto 10%-e supera je la valoro de la rondirantaj biletoj. Tia garantiaĵo estas pli teoria ol efektiva. Dum ordinara tempo, ĝi estas ja superflua ; se okazas krizo, la kurso de la titoloj preskaŭ necese malplivaloriĝas kaj la garantiaĵo fariĝas iluzia ; plie, se oni devus en kelkaj tagoj vendi tian grandegan amason da titoloj, la falo estus terura.

Laŭ la tria sistemo, uzata en Francujo, oni simple fiksas leĝe la sumon, kiun ne povas superi la valoro de rondirantaj

biletoj. Tia sistemo absolute nenion garantias : nur la kredito de la ŝtato, kiu kontrolas la bankon, kaj la graveco de la negocado de la Banko mem firmigas la valorecon de la biletoj.

— J. N.

Hunda sagaceco. — Oni sciigas el Innsbruck rimarkindan ekzemplon de hunda sagaceco. Du turistoj suprenrampis la monton Stivon, kiam ili renkontis hundon, kiu obstine rifuzis ilin preterlasi, provante per bojoj ilin allogi al alia vojeto.

Mirigite, la du vojaĝantoj sekvis ĝin, kaj la besto kondukis ilin al malsupro de kavaĵo, kie kuŝas ĝia mastro, profesoro ĉe la Universitato Lubeka.

Per multaj zorgoj tiu profesoro, kies ambaŭ kruroj estis rompitaĵ, estis transportata en hospitalon, kie li nun atendas la resaniĝon, dum la savinta hundo, kuŝas apud lia lito. *P. Ch.*

Por la flatelistaro. — Kiuj estas la plej maloftaj kaj karaj poŝtmarkoj? *Angla Gujano* 1856, 1 c., ruĝa; *Angla Gujano* 1850, 2 c., rozkolora; *Maŭrico, post-office*, 2 p., blua; *Maŭrico, post-office*, 1 p., oranĝkolora; *Moldavio* 1858, 81 paras, blua; *Hawai* 1852, 2 c., blua; *Kanado* 1851, 12 pen., nigra; *Toskano*, 3 lire, oranĝkolora; *Reunion* 1857, 30 c., nigra; *Aŭstrujo*, ruĝa, Merkuro; *Nova-Zelando* 1872, 1 p., bruna, filigrano; *Natal* 1857, 9 p., blua.

La valoro el tiuj paperaj kvadratetoj ŝanĝiĝas de sep ĝis ok mil frankoj, kaj eĉ pli.

La sekreto de la turo de Glamis. — En Skotlando, en malhela kastelo estas ankoraŭ pli malhela ĉambro. Kian misteron ĝi enhavas? Timinda sekreto, observita de multaj centjaroj, timigas la popolon, kaj konfuzas la fremdulon.

Tion nur konas kune du vivantoj; tiu, kiu portas la titolon Grafo de STRATHMORE, kaj lia unuenaskita filo, al kiu li malkovras ĝin en la tago, kiam la junulo atingas sian plenaĝon. La grafo tiam alkondukas lin al la timinda ĉambro, en kiun li de tiam neniam devas penetri.

Kio tie vidiĝas? La junulo reaperas timigita, maljunigita, kaj por ĉiam malĝojigita. Oni rakontas, ke la sola memoro pri tiu ĉambro, elvokita de malprudenta kunmanĝanto en tagmanĝo, sufiĉas por tremetigi la grafon de Strathmore. Neniu scias la veron pri tio.

Legendo diras, ke iam, dum militado inter LINDSAY kaj OGILVIE, multaj ogilvianoj estas enfermitaj en tiu ĉambro, kaj elmortigitaj. Ĉu tiu ĉambro estas ankoraŭ plena je iliaj ombroj? Antaŭ kelkaj jaroj — ĝi estas ĉiam la legendo — la grafo por malkvietigi la bruojn elvenantajn el la ĉambro, aŭ pro alia kaŭzo, tien envenigis masonistojn. Monon ricevis ĉiuj el tiuj kiuj tie laboris kaj estas senditaj en Kanadon. Post kelkaj tagoj, lordo GLAMIS, unuanaskito de l'grafo de STRATHMORE, estos plenaĝa kaj siavice posedanto de l'sekreto. — P. Ch.

La ŝuoj de Voltaire. — Voltaire havis serviston fidelan, sed iom mallaborem. « Jozefo, diris unu tagon la mastro, alportu miajn ŝuojn. » La servisto rapidas alporti la ŝuojn ; sed Voltaire kun miro rimarkas, ke la ŝuoj ne estas purigitaj kaj li diras al Jozefo : « Vi forgesis broŝadi miajn ŝuojn, hodiaŭ. »

— Ne, Sinjoro, respondas la servisto ; sed la stratoj estas kotplenaj : post du horoj, viaj ŝuoj estus tiel malpuraj, kiel nun.

Voltaire ridetas, vestas la ŝuojn kaj foriras. Sed Jozefo kuras al li :

— Sinjoro, li krias, la ŝlosilon !

— Kian ŝlosilon ?

— Jes, la ŝlosilon de la manĝujo, por la tagmanĝo ?

— Nu, kiabezone ? Post du horoj vi estus tiel malsata, kiel nun !

De tiam, Jozefo zorge broŝumis ĉiutage la ŝuojn de sia mastro.

La XIV^a internacia pacifista kongreso en Lucerno.

Dankante por la afabla deziro de la redakcio mi volas rakonti kelkajn detalojn pri la interesa kaj sufiĉe sukcesplena kongreso de niaj karaj kuzoj pacifistoj, esperantistaj kaj — plej multaj — esperantemaj, ĉefe la legontojn atentigante je tiuj partoj, kiuj atingas la demandon de lingvo internacia. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pli bonvolu legi la detalan reporton en *Espero pacifista*.

Laŭ la regularo estas permesataj je la pacifistaj internaciaj kongresoj la lingvoj angla, franca, germana, itala kaj kongreslanda (ezemple la rusa, se — espereble baldaŭ — estos la kongreso en St.-Petersburgo). Ĉiuj de la diritaj kvar nacioj estas rajtigitaj postuli la traduko, tuj post la originala parolado ! Hazarde la ĉeestintaj italoj forlasis sian rajton kaj nur (!) du tradukadoj devis esti farataj. Tio ĉi jam estis bedaŭrinda malŝparo de tempo, sed la diverslingveco ankoraŭ havis la alian malgrablaĵon, ke la nekomprenantoj ofte parolis, eble nur babiladis, kun la najbaroj, sed certe ĉiam enuiĝis dum du trionoj de la kongrestempo. Estas tio ĉi tute netolerebla, tute neebla, kiel certigis min multaj kongresistoj, speciale ĉiuj estintaj en nia Boulogne' a kongreso.

Sed ne nur praktika kaŭzo parolas por la enkonduko de helpa lingvo sed ankaŭ morala : espereble baldaŭ ĉestos je la internaciaj kongresoj ankaŭ *japanoj* kaj pli ol unu,

kiel en Lucerno — ĥinoj kun la ceteraj eŭropanoj aŭ la kongreso mem estos ekzemple en la klasika urbo Ateno aŭ en la belega Konstantinopolo ; kvankam la tieaj pacifistoj certe *komprenas* la francan aŭ la anglan lingvon, ili ne *parolas* ĝin sufiĉe flue aŭ silentos ili aŭ ofendos la orelojn de multaj ĉeestantoj — kiel bonege diris nia antaŭbatalanto Gaston Moch en sia detala raporto dediĉata al la kongreso pri internacia lingvo — kaj ĉiam unu partio estos preferota la samlingvuloj de ĉiu parolanto. La enkonduko de lingvo internacia, sammaniere fremda kaj konata al ĉiuj kongresanoj, estas demando de justeco.

Por la praktika juĝado estas rigardinde, ke ĉiuj kongresoj — ne nur pacifistaj — estas plej vizitataj de personoj iom maljunaj, ne konantaj la gravecon de internacia lingvo, speciale esperanton, kaj malinklinaj lerni pluan lingvon.

Mi tre detale priparolis tiun ĉi staton de la afero por atentigi niajn samideanojn, ke ankoraŭ granda laboro farinda, staras antaŭ la pordo.

Plezure mi vidis en la klara paca kaj milita muzeo la portreton de nia kara majstro pentritan en Boulogne de samideano Moscheles kaj esperas, ke mi baldaŭ povos vidi aliajn esperantistarojn en la nova konstruaĵo, por kiu grandanima pacifisto donacis ses cent mil frankojn ekstaru baldaŭ por esperanto simila amiko !

Revenante al la efektivo mi devas rakonti ke en la senalkohola kotelo sidante je mia kafo mi ekĝojis alparolata en esperanto. Sed tuj la ĝojo malaperis, kiam mi eksciis, ke mia pacifista kolego estas la riprezentanto de la « idiom neutral ». Tamen ni baldaŭ estis amikoj, ĉar sen laboro mi povis konvinki la sinjoron, ke je la nuna stato de la demando oni tute ne devas paroli pri du diversaj internaciaj : eĉ fine sinjoro R** aliĝis al la espero pacifista, kies ĝenerala kunveno devas esti laŭ regularo en la sama urbo kun la internacia pacifista kongreso. Pri la pacifista parto de tiu ĉi kunveno, (kies dato estos la 21-a de septembro, je la vespero, loko la urbestrejo), skribis la senlaca prezidanto sufiĉe detale en la unuiga revuo ; tie ĉi mi devas raporti ke multaj ne esperantaj pacifistoj, sekve de afabla invito, ceestis al la kunveno kun granda intereso ; eĉ la pacifistoj demandis legan provon (por esti bone konvinkataj, ke la elparolata diverseco nenie malhelpas la interkompreniĝon) — kiel atendinde brile efektivigitan.

Tamen la decido de la pacifista kongreso ne estis por ni tiel favora, kiel ni ĉiuj esperis oni tute ne volis permesi

la uzadon de esperanto en la plej proksima kongreso kaj presigi la kongresdecidojn france *kaj* esperante, sed oni nur komisiis la internacian pacan oficejon en Berno je la klarigo de tiu demando : tio ĉi estas komenco kuraĝiganta, kaj la spertaj esperantistoj kontentigis ; sed longa kaj laborplena vojo estas antaŭ ni, ĝis dua internacia kongreso — unua estas do nia Boulogne'a ! — decidu la nuran uzadon de unu lingvo internacia : esperanto. La jaron 1906 la mondo festos la simplonan tunelon, la novan direktan vojon de Parizo al Milano, kaj la pacifistoj kunvenos ĉi tie niaj svisaj samideanoj intencas organizi nian kongreson en Ĝenevo, la bela laga urbo. Vojaĝu multaj esperantistoj kaj tien ĉi, por konfirmi la lingvan kaj amikan ligan, kaj tien por klarigi al niaj gekuzoj la taŭgecon, la perfektecon de nia amata esperanto. (Ni posedas jam en Milano kelkajn kolegojn, sed ne ankoraŭ grupigintajn ; bonvolu tiuj ĉi ne forgesi, ke la aliĝo al grupo « ne estas ordonita sed dezirinda » kaj legigi nin baldaŭ pri la nova esperantista grupo fondita en Milano !

Pri la pacifista kongreso mem mi nur mallonge volus paroli ĉiuj estis feliĉaj ke la milito en la malproksima oriento finiĝis, kies elpezoj estas terure grandaj, kvankam decido ne estis farata, laŭ la antaŭdiraĵo de la glora rusa pacifisto, sinjoro v. Bloch !

Sed senlima, eĉ ne priskribebla estis la ĝojo de la tuta kongreso en la momento, kiam francano Passy premadis la manon de profesoro Quidde, riprezentanto de Germanlando, kaj simile granda estis la aplaŭdado donata al la vortoj de sinjoro Appleton de Nottingham, je la nomo de du milionoj da anglaj laboristoj certiginta, ke tiuj ĉi volegas la pacon kun siaj germanaj kuzoj kaj tute estas fremdaj al la partio de ĵurnaloj deziranta malpacon kaj militon.

Kaj neforgeseble restos la franca parolado de ĥina kunfrato, kiu rakontis, ke la ĥinoj ĉiam volas nur pacon kun la tuta mondo.

Sed mi promesis nur paroli mallonge pri la rezultatoj kaj niaj legantoj sendube elprenis el la ĵurnaloj la aliajn detalojn.

Estu la XIV-a kongreso la komenco de ĉiam kreskanta interkompreniĝo de l'homaro. Certe ni esperantistoj faros la eblon por liveri taŭgan instrumenton por tia celo korege dezirinda.

(Frankfurt a. M.)

D-ro J. HANAUER.

Terkultura Kalendaro

FEBRUARO

La kamparo. — Alternajn kulturaĵojn nun la kulturisto pretigas. Tre bone estas anstataŭigi la rikoltojn per samnaturaj rikoltoj; ekzemple, anstataŭigi havenon per hordeo, aŭ printempa sekalo, marta greno, poligono, milio; trifolion ordinaran per viandroza trifolio; kolzan brasikon per printempa napeto; betojn per napoj, ktp.

En la *kampoj*, oni finas la plugadon; oni erpas kaj rulbenigas ilin; poste oni semas. Sed oni ĉiam atentu la sidon de la tero, kaj la varmgradon de la loko. En movebla kaj varma tero oni povas semi tri semajnojn pli frue ol en malvarma kaj malseka tero; pli bone estas prokrasti la semadon ĝis aprilo, ol senutile semi.

La plej urgaj semadoj estas tiuj de la fabetoj, papavoj, kiujn ni nomas nigra papavo, kaj de la martaj grenoj. Fortajn teraĵojn postulas la fabetoj; tial oni plivole metas ilin inter du grenplantoj. Ne semu ĵetfluge; kaj enmetu 120 litrojn da semo por unu hektaro proksimume. La martan grenon oni ne povas plu semi post la kvina de marto; plej bone estus ĝin semi en februaro, metante du (2) hektolitrojn da semo por ĉiu hektaro. — Malpezan sed nutreman teron bezonas papavo, kiun oni fluge semas, uzante 2 aŭ 3 kilogramojn por ĉiu hektaro.

Oni semas poste laŭvole sekalon, hordeon, avenon, ĉiuspecajn betojn, pastinakojn, karotojn, ĉiuspecajn pizojn kaj brasikojn, lentojn, kanabon kaj linon, tabakon, rafanojn, porelojn, ktp.

Sed ni revenu domen, ĉar niaj hejmaj bestoj ne devas esti forgesataj.

La samajn zorgojn ni uzu, kiel en la antaŭa monato, pri la nutraĵo de bovoj, ŝafoj, porkoj, kiel pri la staloj, ŝafejoj, porkejoj, abelujoj, kaj pri la birdkorto.

Varmetajn supojn oni donas al grasiĝantaj bestoj, kaj al *bovinoj*, kies lakton oni melkas. La junaj *bovidoj*, nutritaj dum unu monato per senmiksa lakto, ricevos senkremitan lakton, kunmiksitan kun faruno.

La *ŝafoj* ekstere sin ekpaŝas; oni tiam pligrandigu la kvanton da salo en ilia nutraĵo. Oni apartigu de iliaj patrinoj la *ŝafidojn* naskiĝintajn en oktobro aŭ novembro.

Oni apartigu laŭ diversaj fakoj la *porkinojn* tuj naskontajn; sed oni tre zorgu doni al ili malmulte da pajlaĵo por eviti la sufokiĝon de la malgrandaj *porkidoj*; tiuj ĉi, preskaŭ tuj post sia naskiĝo, ricevos varmetan trinkaĵon konsistantan el akvo, lakto kaj faruno.

La *kokinoj* kaj *meleagrinoj* komencas liveri ovojn. Oni kovigu ilin, nome la kokinajn kaj anserajn ovojn. Oni povas submeti sub Hindajn kokinojn kovotajn ovojn de kokino aŭ de ansero. Oni grasigu la *kaponojn*, oni tre zorgu pri la kokidoj, metante ilin en ĉambretojn helajn kaj bone aerumitajn.

La ĝardeno. — Oni daŭrigu en la *frukta ĝardeno* planti kaj tondi la arbetojn kaj rozujojn, se la vetero tion permesas; kompreneble ne plantu dum frosta vetero, aŭ tuj post degelado; la ĉerizujojn kaj abrikotujojn plenaerajn kaj je alta trunketo, enterigu pli profunde ol la aliajn specojn. Oni povas ekvidi la tufojn de la persistaj kreskaĵoj, kaj komenci ilian replantadon; mallevu la frambujojn, kaj formetu la trunketojn, kiuj fruktedonis; ĉiam senraŭpigu zorge la fruktoĝardenon.

La laboraĵoj en la *legoma ĝardeno*, ĝis la mezo de l'monato, estas la samaj kiel en la antaŭa monato. En la dua parto de la monato oni finas ĝustloki la printempajn brasikojn, oni daŭrigu semi la pizojn « Michaux », marĉajn fabojn, loniceron, karotojn, porelojn, pastinakojn, petroselon, bulbojn, ajlojn, ktp.; oni renovigu la semojn de rafanetoj; oni semu ankaŭ romanajn salatojn, latukojn, milanajn brasikojn, kapajn brasikojn.

Trabatu per la piedoj la semojn por maldikaj semajoj ne enterigante tiujn ĉi, kaj superdisŝutu iom da bona sterkaĵo aŭ da tre konsumita vegetala tero.

Oni samtempe daŭrigu observi la bedajn kulturojn; oni konstruu varmetajn bedojn, sur kiuj oni ĝustloku melonojn, tomatojn, ktp., semitajn sur varmaj bedoj. Oni idareje kunkontraŭplantu la florbrasikojn, latukojn, ĉikoriojn, ktp., kiujn post la frostoj oni enmetos en plenan teron.

Oni semu kaj kontraŭplantu senĉese, sub vitraĵo, melonojn, kukumojn, tomatojn, rafanetojn, florbrasikojn, latukojn, ĉikorion, celerion, ktp.; oni aerumu kiel eble plej bone, kaj oni zorgu pri konstanta varmo.

Ne provizu la oranĝerion aŭ la malvarman flordomon, eĉ okaze de frosto, per pli ol 5 ĝis 6 gradoj C. da artefarita varmo, kaj la kreskaĵojn tie enhavatajn surverŝu nur por ke ili ne suferu sekecon. Malebligu ankaŭ la malvarmajn aerfluojn en la varmejo. Enŝprucigu la orkidojn, bromeliojn florintajn aŭ ekflorantajn. Oni daŭrigu planti la brranĉetojn radiknaskontajn de la krisantemoj. Oni multigu ĉiaspecajn varmejajn kreskaĵojn Koleon, Begonion, Heliotropon, Salviojn, Alirantesson, Alternanteron kaj ĝenerale ĉiujn varmejajn kreskaĵojn, difinitajn por la ornamo de florigardenoj dum somero. Ordigu per vicoj aŭ masivoj la violojn, semitajn en aŭgusto, plantu la bulbojn de la ranunkoloj.

Por la kreskaĵoj, ni devas atentigi preterdire pri la influo de kamforo. Laŭ la *Gardener's Chronicle*, la kamforo tre rimarkinde rapidigas la ĝermiĝon de la kreskaĵoj kaj la enradik-

iĝon de la plantaj kreskaĵetoj. Sufiĉas, antaŭ ol semi aŭ enportigi ilin, ke oni trempu la semojn aŭ la plantitajn kreskaĵetojn en dolĉan akvon al kiu oni miksis kamforon, proksimume pecon dikan kiel unu juglando, por duonlitro da akvo.

En la *herbejoj* oni devas plibonigi la malnovajn defluilojn, kaj iafoje fari novajn. Zorgu ankaŭ disŝuti la talpejojn kaj detruu la kolĉikon, poste ĉiuspecajn sterkaĵojn surmetu sur la herbejojn : fulgojn, cindrojn, kolombsterkon, precipe sterkan fluidaĵon ; samtempe klopodu eksanigi la malsekajn terojn, forportigante per tuboj la troan akvon entenantan en ili, precipe en tiuj, kiuj ricevos la semojn en la fino de februaro aŭ en la komenco de marto ; estas necese plie ke vi purigu la fosaĵojn, aranĝu la vojojn kaj palisarojn.

Pri la palisaroj mi raportos la jenon rilatantan al akaciaj fostoj ; ĝi estas eltirita el la « Gazeto de la Kamparoj ». « Unu observado pruvis, ke la akaciaj fostoj estas pli daŭremaj ol la kverkaj. Ekzamenante ĝardenan palisaron, faritan en jaro 1886, oni rimarkis, ke la kverkaj fostoj estas ĉiuj putritaj en sia entera parto, dum la akaciaj fostoj estas ankoraŭ tre fortikaj. »

La laboraĵoj pri la *vinberujo* komenciĝas post la dekkvina de februaro. Oni tiam riparas la ilojn, akriĝas la palisojn, tranĉas la salikojn. Poste la vinberkulturisto okupas sin ĝis la unua de aprilo plej malfrue per tondado de vinberujoj, plantado de kreskaĵetoj enradikiĝontaj, kaj plugado de la tero per fosilo. Ĉio tio ĉi estas necesega kaj grava afero.

Oni semas alnon, oni valorigas la arbetarojn, kaj kapsalikojn ; la saliko, ulmo, frakseno liveras bonajn ŝtipojn.

Plej grava afero en tiu momento estas la tondado de arboj. Oni devas senintermanke ĝin fari, se nur videble la vetero tion permesas. Antaŭ ol tondi, liberigu la branĉojn de la spaliroj antaŭe fiksitajn, por malebligi la sulkiĝojn kiujn eble kaŭzus la malnovaj ligiloj ; antaŭ ol ligi denove, post la frostoj, surtiru la ferfadenojn. Rapidu antaŭ ĉio tranĉi la greftotajn branĉetojn, ĉar tuj kiam ekvekiĝos la vegetado, vi ne povos plu tion fari. Memoru fine, por forgesi nenion, ke ĉiuj ŝirmiloj devas esti preparitaj jam en februaro.

P. CHAMPION

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

La Proverboj en Esperanto.

Jam de longe mi havas rimarketojn por fari al tiuj, kiuj iom penadas por la propagando de nia lingvo. La Kongreso Esperantista okazis la pasintan aŭguston, kaj laŭ mia opinio, la esperantistoj diversnaciaj interkompreniĝis kiel eble plej bone. Ĉiuj, kiuj memoras niajn kunvenojn, niajn teatraĵojn kaj la paroladojn estas certaj nun, ke Esperanto tute taŭgas por la celo de « Internacia Lingvo ». Multe da rusoj, angloj, germanoj, svisoj, italoj, hispanoj, francoj ktp. ĉeestis la Kongreson, ni sufiĉe konas kaj komprenas la diferencojn de ilia uzado de la lingvo, rilate al la frazfarado kaj eĉ al la elparolado, kaj ofte tiuj diferencoj al ni estas tre agrablaj. « Ĉu vi, bonaj esperantistoj, ne multe ŝatas la fremdan akcenton de via kunparolanto, kiam li estas italo, ruso aŭ anglo? » Sendube, jes!

Tiam mi ne bone komprenas, kial malrapidiĝas la disvastiĝo de nia lingvo, kial, iom post iom, oni tiel multe diskutadas pri « Gramatiko » anstataŭ lernigi al kelkaj novaj adeptoj la dek ses mirindajn regulojn genie elpensitajn de nia kara Majstro.

Ĉiu esperantisto havas ian energion, ian volon, ian rolon por nia afero sed malfeliĉe, preskaŭ ĉiuj esperantistoj imagas al si, ke dank' al Esperanto, ili baldaŭ fariĝos famaj verkistoj aŭ poetoj, famaj gramatikistoj aŭ proverbistoj, kaj ili uzas sian energion kaj volon al la disvastiĝo de danĝeraj ideoj por nia lingvo.

Permesu al mi kelkajn vortojn pri la proverbaro esperanta. Mi estas nek lingvisto nek gramatikisto, mi nur ĉeestis la kursojn de la unuagradaj lernejoj, mi lernis poste iomete la anglan, germanan kaj esperantan lingvojn, jen estas mia tuta pakajo da sciaĵoj, do scienculoj, senkulpigu min ĉar mi petas de vi la sekvantajn klarigojn

« Ĉu vere estas necese, ke nuntempe Esperanto posedu proverbojn, cetere ĉu tiuj proverboj estos kompreneblaj aŭ helpos multe al la interkompreniĝo? »

Laŭ mia opinio, la proverbaj esprimoj ne povas esti internaciaj ili estas kvazaŭ idiotismoj ne nur specialaj al ia lando, sed ofte tre specialaj al ia provinco aŭ familio; la proverboj ankaŭ maljuniĝas kaj malaperas post kelka tempo da uzado; plie, tiuj idiotismaj esprimoj estas tio, kio preskaŭ ĉiam malhelpas la studentojn por la lernado de la fremdaj lingvoj. Se Esperanto havus tute pretigitajn frazojn, ĝia simpla gramatiko ne plu estus necesa kaj malfeliĉe estus pli granda laboro lerni frazojn, plej ofte ne internaciajn, ol vortojn. Tiuj, kiuj ne havas tempon aŭ eblecon studi nian lingvon, dum almenaŭ tri jaroj, nur scius

la vortojn de la lernolibroj, ili do povus esti certaj, ke ilia scienco tute ne sufiĉus por grava diskutado, ĉu en internacia Kongreso ĉu en komercaj rilatoj.

Mi jam petis de fremduloj la bonvolon esprimi france kelkajn ideojn per proverboj, sed mi ĉiam rimarkis ilian embarason, kvankam ili bone kaj de longe parolas nian nacian lingvon, mi mem provis angle kaj neniam sukcesis naski ian spritaĵon.

Oni multe ridegis, kiam iafoje mi diris, ke eĉ la diverslandanoj ne ridas pro la sama kaŭzo, tamen tiu, kiu iom vojaĝis ofte havis la pruvon de mia diro.

Paroloj kaj gestoj ne influas same kontraŭ la nervaro de ĉiuj fremduloj kaj sekve, spritaĵo, figuro aŭ ŝerco ne inspiras al ĉiuj la saman senton.

Unuvorte, la veraj bonfarantaj esperantiŝtoj, kiuj nur laboras por Esperanto kaj ne volas mortigi nian belan lingvon, devas kontraŭstari ĉiujn, kiuj provas enkonduki, pro vanteco, en la esperantan literaturon nelogikajn aŭ figurajn esprimojn.

G. GROSSET

MOVADO ESPERANTISTA

Brita

Londona Klubo. — Tiu ĉi klubo havis kelkajn tre agrablajn kunvenojn en St.-Bride's Institute, Brideane, Fleet str., kaj bone akceptas vizitantojn ĉiuvendrede vespere. Vizitantoj el Francujo kaj Rusujo jam konstatis tie la valoron de Esperanto. — Diversaj gravaj edukistaroj pripensas la akcepton de Esperanto en siajn oficialajn programojn, sed ĉar detaloj ankoraŭ ne alvenis, nuntempa sciigo estas neebla. — Kursoj okazas, en St.-Bride's Institute, ĉiuvendrede; en la Thomas Binney Institute, Thomas-street, Regent-street, W., ĉiumerkrede; je 8,30, kaj ĉe la Cooperative Brotherhood, 37, Newington-green-road, ĉiuŝaŭde, je 8, 15. Kurso por progresintaj lernantoj okazas en Mowbray House, Norfolk-street, Strand, ĉiumarde, je 6, 30.

Bristol. — Nova grupo estas fondita la 7-an de decembro por Bristol kaj la ĉirkaŭaĵo. La sekretario, provizore, estas Pastro J. A. JAMES, Dodington Rectory, Chipping Sodbury.

Cheltenham. — Ni plezure anoncas, ke pastro D-ro FLECKER, lernejestro ĉe la « Dean Close » lernejo, afable konsentis iĝi prezidanto de nia grupo. Li aranĝis, ke la Rev. A. POYNDER, la sekretario de la grupo, alparolas kvarfoje al la knaboj; ĉar S-ro POYNDER ĉeestis ĉe Boulogne'a Kongreso, li havis multe da interesaj sciigoj por komuniki.

Batley. — Post parolado de S-ro F. L. G. MARÉCHAL B. A., profesoro ĉe la Batley Grammar School, nova grupo estas fondita en tiu lernejo. La estraro estas: honora prezidanto: S-ro MARÉCHAL; prez. S-ro G. H. KILBURN, M. A.; vicprez.: S-ro T. A. PARR; honora sekretario: S-ro J. T. ROTHWELL. Ni esperu ke aliaj lernejoj baldaŭ imitos la bonegan ekzemplon de Batley, posedante sian propran grupon, ĉar ĉe la junularo Esperanto atendas sian finan triumfon.

Bridgwater. — Kelkaj gesinjoroj komencis lerni Esperanton en tiu ĉi okcidenta urbeto. Tiuj ĉi kunvenis ĉe S-ro DILKS, kaj montris avidigon pri la helpa lingvo. Kiam estos sufiĉa progreso, tiam oni formos grupeton por interparolo, legado kaj deklamadoj. La unua Esperantisto en tiu ĉi urbeto estis S-rino SUTCLIFFE.

Deal. — La 22-an de novembro, la sekretario, S-ro C. E. COWPER, faris publikan paroladon, sub la prezido de la urbestro; la klubo varbis naŭ rekrutojn. La 30-an de novembro, nova kurso komencis en St.-Georges Hall. La 6-an de decembro, societa kunveno; oni invitis najbarklubanojn; kelkaj Dover'aj klubanoj partoprenis. Kantoj, ĥoraĵoj, deklamadoj, legadoj, rakontetoj kaj ludoj; granda sukceso. Lernkunvenoj ĉiun ĵaŭdon kaj vendredon. Klubanoj registritaj, 47.

Dovero. — La jaroj de la Dovera grupo sendas al ĉiuj samideanoj, konataj kaj nekonataj, la plej korajn bondezirojn por la Nova Jaro. Dum la decembra monato, la nombro da agemaj jaroj tre kontentige pligrandiĝis, kaj estas nun 40 tiaj enskribitaj en la adresaro. Speciale notinda estas la progreso de la nova kurso por sinjorinoj, el kiuj kelkaj partoprenis je kunveno en la apuda urbo, Deal.

Forest Gate. — La titolo de tiu ĉi grupo ĵus ŝanĝiĝis en « The West Ham Esperantist Society », kaj la jaroj nun kunvenas ĉiumerkrede vespere en Workmen's Hall, Romford-road, Stradford. Instruisto, S-ro MOTTEAU; honora sekretario, S-ro B. J. RAYNER, 138, Monega-road, Forest Gate.

Glasgow. — La eksprezidanto de la Glasgow'a Societo, S-ro C. FRED POLLOCK, M. D., F. R. S. E., faris paroladon pri Esperanto, antaŭ granda aŭdantaro, en la Halo de Wellington Preĝejo, Hillhead. Li rakontis la historion pri la deveno kaj kreskado de la lingvo rilate al la samtempa historio de D-ro Zamenhof. La karakterizaj trajtoj de Esperanto, ĝia celo, ĝia utilo kaj ĝia sukceso estis ĉiuj plene pritraktataj.

Woodford. — Fondo de Esperantista grupo estas decidita. Sekr. S-ro A. E. FULLER, 14, Eastwood road, South Woodford.

Yeovil. — Aro da dek-naŭ membroj estas grupigita en tiu ĉi loko; de S-ro H. W. SOUTHCOMBE (The Park, Yeovil).

Norda Politeknika Instituto, Londono. —

Responde je la peto de nia kunlaboranto, S-ro G. L. BROWNE, la estroj de tiu ĉi instituto permesis, ke oni tie instruu Esperanton, kaj konsentis prunti ĉambron por tiu celo. Kursoj, do, malfermiĝos en januaro, por komencantoj kaj por tiuj, kiuj jam lernas la lingvon. Oni instruos studentojn por ekzameno de la Londona Cambro de Komerco. Sin turnu al la instruonto, S-ro BROWNE, 432, Birkbeck Bank-building, High Holborn, W. C. (Laŭ *British Esperantist*)

Germana

Barmen. — La grupo havas nun 18 anojn, kiuj kunvenas regule. Afiŝoj estas pendigitaj en 3 restoracioj.

Berlin. — La esperantista grupo havis sian ĝeneralan kunvenon. Oni reelektis la antaŭan estraron, kun plie S-ro BRUHL, kiu fariĝis sekretario. La financa situacio iom pliboniĝis dank' al malavaraj monoferoj. — Nova kurso estas komencota en januaro. — Raporto estas dissendita al 26 berlinaj gazetoj. (Laŭ *Germana Esperantisto*.) — O. L.

Braunschweig. — S-ro WALLON, la fondinto de la tiea esperantista klubo transloĝiĝis en *Breslau*. — Nova kurso kun 51 lernantoj estas komencita en la drogista akademio; Prof. D-ro FREISE gvidas ĝin.

Elbing. — Fondiĝis esperantista klubo, kiu havas jam 35 membrojn. Aparta sekcio estas dediĉita por sinjorinoj. Prez.: S-ro H. GREFF, Aeusserer Mühlendamm, 97. — S-ro MRONGOVIVUS, instruisto en la komerca lernejo, intencas enkonduki tien nian lingvon.

Karlsruhe. — P-ro MAINZER, prezidanto de la esperantista grupo, tre fervore propagandas. Li paroladis en Mannheim, plej granda komerca urbo de Badenlando, ĉe la *Deutschnationale Handlungsgehilfenverband*. Alvenis ĉirkaŭ 600 personoj, kaj estus venintaj pli multaj, se la halo estus estinta pli granda. Post la parolado tuj 40 personoj enskribigis sin por esperanta kurso, kiu estos gvidata de profesoro MAINZER, kvankam por tio li devas ĉiufoje vojaĝi ĝis la tria horo matene. La supre nomita societo intencas fondi grupon en Mannheim kaj disvastigi la lingvon en kiel eble plej multaj aliaj grupoj de la societo en Germanujo. — La sama samideano varbis dekon da instruistoj en Magdeburg kaj per ilia helpo interesis stenografajn societojn kaj povis fari paroladojn en stenografistaj rondoj en Hildesheim kaj Hannover. La unuan vizitis 200 personoj; la lokaj gazetoj favore priraportis. La duan venis ankaŭ multaj personoj. Malnova volapükisto klopodis kontraŭstari, sed enfine li konfesis, ke li estas konvinkita. Tie Prof. MAINZER revarmigis anon de la eks-grupo esperantista Nurnberga, fondita en jaro 1887. — En Karlsruhe fondiĝos baldaŭ grupo de esperantistaj instruistoj. KARL SUCHER

Stuttgart. — Paroladojn havis P-ro CHRISTALLER en diversaj societoj: Volksbibliothek, Arbeiterbildungs-Verein, Verein württ. Verkehrsbeamten. Kurso komenciĝis. Gazetoj *Neues Tageblatt* kaj *Schwäbische Tagwacht* priraportis. La infana revuo *Der gute Kamerad* enpresis bonegan artikolon.

Ulm. — S-ro EBERLE daŭras vigle labori. Li paroladis en Laupheim, en Ostheim kaj diversfoje en Ulm. Niaj Ulmaj amikoj kunvenas regule. Multaj « Cefeĉoj » estas disdonataj. (Laŭ *Germana Esperantisto*.) — O. L.

Weiler a/Thann. — S-ro KRICK fondis Steno-tachygraphen-Esperantisten-Verein. Loka gazeto raportis pri tio.

Wiesbaden. — Grupo fondiĝis en decembro. Prez. S-ro W. SCHMIDT, Weilstr. 6.

Franca

Agen. — La ĝenerala kunveno de la grupo okazis. La nombro de la grupanoj pligrandiĝis dum la pasinta jaro. Ili estas nun 107, anstataŭ 74. La kursoj estas regule farataj ĉiumerkrede kaj kunvenigas dudekon da gelernantoj.

Aix-les-Bains. — D-ro COZE sukcesis tie fondi grupon. Car Aix-les-Bains akceptas kun multo da Francoj tre grandan nombron da fremduloj, ĝi estas por la propagando bonega kampo. *Honora prezidanto*, S-ro MOTTET, urbestro; *Prezidanto*, S-ro CHABRAN, direktoro de urba lernejo; *vicprezidanto*, S-ro GAUDIN, hotelmastro; *ĝenerala sekretario*, D-ro COZE, kuracisto.

Bordeaux. — Publika kurso okazas ĉiuĵaŭde en ĉambro de *Cercle orphéonique*. La enskribo, senpaga por la grupanoj, kostas 1 fr. por la ceteraj personoj. Vin turnu al S-ro BRUNET, 59, cours Victor-Hugo.

Bourges. — La kursoj rekomenciĝis kun sukceso. Elementa kurso, 40 lernantoj, profesoro S-ro ESSELIN; ekzerco de interparolado, 20 lernantoj, profesoro S-ro FILLOUX; militista kurso en militista ĉambro, 80 aŭdantoj, profesoro S-ro ESSELIN. — Kelkaj gazetoj, nome *L'Indépendant du Cher*, kaj *La Dépêche du Berri* presis artikolojn pri la kongreso en Boulogne kaj pri la Esperantista Centra Oficejo.

Caen. — S-ro LESPESQUEUR, grupano de Alŕer, komencis kurson tuj sekvitan de kvindeko da geaŭdantoj. Multaj sinjorinoj. En sia ĝenerala kunsido, la grupo sin organizis. *Prezidanto*, S-ro LESPESQUEUR; *sekretario*, S-ro SPICQ. Car novaj aliĝoj ankoraŭ alvenas, dua serio da kursoj estas malfermata por la membroj aliĝintaj post la unuaj lecionoj. La urb-

estraro pruntis al la grupo ĉambro de la pavilono de la klerulaj societoj. *Le Moniteur du Calvados* kaj *Le Journal de Caen* presis kelkajn bonegajn artikolojn pri Esperanto kaj pri la kunvenoj de la grupo.

Chaumont. — La gazetoj *Le Petit Haut-Marnais*, en Chaumont, kaj *Le Spectateur*, en Langres, raportas pri parolado senprepare farita, de S-ro MOISSENET, honora prezidanto de la Chaumont'a grupo. Tiu parolado prezidita de S-ro HENRY, urbestro de Montigny, okazis tre sukcese en la knabolernejo antaŭ cento da geaŭdantoj. Ni esperas, ke S-ro LEGROS, direktoro de la elementa lernejo en Montigny, kiu lernas mem Esperanton, povos baldaŭ instruadi pri ĝi siajn plej bonajn instruatojn. — S-ro MOISSENET utiligis ankaŭ neatenditan okazon por fari malrekte prosperantan propagandon en *Unuigitaj Statoj de Norda Ameriko*. Renkontinte en vagonaro S-ron JAKOB HEILBORN, 1045, Old South Building, en Boston (Mass), li parolis pri Esperanto tiel konvinke, ke S-ro HEILBORN tuj aĉetis en la librejo de stacidomo Esperantajn libretojn kaj intencas varmege rekomendi tiun lernadon al la lernantoj kaj profesoroj de la tre konata Amerika Universitato *Harward*.

Cherbourg. — S-ro DELAHAY, iniciatis klopodadon por Esperanto. La plimulto da ĵurnaloj en la departemento (*La Vigie de Cherbourg*, *Le Réveil de Cherbourg*, *Le Messenger*, *Le Journal de la Manche*, *Le Progrès de Coutances*, *Le Nouvelliste du Cotentin*, etc.) enpresis laŭdajn artikolojn pri nia lingvo. Fine, niaj samideanoj kolektiĝis en la Urbdomo kaj fondis grupon. *Prezidanto*, S-ro DUVAL, helpanta instruisto; *vicprezidanto*, S-ro MESTREL EMILE, maristara desegnisto; *sekretario*, S-ro DELAHAYE, en Saint-Hilaire par Carentan; *kasisto*, S-ro AUTIN, helpanta instruisto, rue de la Cayenne, 30, en Cherbourg. *Membroj* S-ro BIARD, direktoro de l'*Réveil*, en Cherbourg, MENIGAN, armilfaristo en Cherbourg, D-ro AUVRAY, en Périers, LEGOUL, honora notario en Cherbourg, MARIETTE, instruisto, en Sainteny kaj JOURDAN, en Cherbourg. La grupo jam enhavas tridek aliĝantojn; ĝi daŭrigos tuj la propagandon kaj certe ricevos multajn aliĝojn. Ĉiusemajne kurso per la reciproka instruado pri Esperanto okazos ĉiuĵaŭde en la Urbdomo.

Charenton. — La 3-an de decembro okazis la disdono de premioj de la Societo *d'Enseignement populaire d'Alfortville*. Estas disdonitaj diversaj premioj de Esperanto al instruistoj de S-ro DEVOUCOUX, prezidanto de l'grupo. — Kelkaj suboficiroj de la 89-a regimento infanteria, loĝanta en la fortikaĵo, sekvas la kurson de S-ro RIGOIR.

La Rochelle. — Ni havas du novajn kursojn ĉiuĵaŭde, posttagmeze, en la urba palaco: unu por la lernantoj de la normala lernejo por instruistoj kaj kelkaj aliaj junuloj, farata de Kom-to Hugues; la alia por infanoj (knaboj kaj knabinoj) farata de Kom-to Liet.

Lyon. — Al la jam anoncitaj kursoj, ni devas aldoni la jenajn, faratajn ankaŭ de S-rino SARPY. Villeurbanne, en la urbdomo; anoncita de urbaj afiŝoj; miksa kurso, elementa kaj supera. — Charpennes, kurso organizita de Societo de Junuloj; tre multe sekvata. — Oullins, en la urbdomo; organizita de la grupo esperantista; elementa kaj supera. — Brotteaux, ĉe la amika societo de junulinoj, kies prezidantino estas S-rino SARPY.

Marseille. — *L'Humanité* sciigas pri la malfermo de kurso ĉe la *Bourse du Travail* de Marseille, farata de D-ro RAPINE, kaj tiuokaze atentigas pri la utilo de la internacia lingvo por la laboristaro, pro la konstantaj komunikoj, kiun ĝi permesos inter la popoloj.

Noyers-Saint-Martin. — Dezirante havigi al si finanĉan rimedon por la propagando, tiu grupo eldonis kaj disvendis, por la profito de sia kaso, diversajn Esperantajn versaĵojn tre konatajn: *Himno al la supera Estaĵo* (1 fr.), *Kanteto de Ofelio* (0 fr. 50), *la Kapelo*, ktp. kun novaj arioj verkitaj de S-ro A. J. TELLIER.

Orléans. — *Le Progrès du Loiret* raportas tre laŭde pri interesa parolado farita de Kapitano CAPÉ antaŭ granda nombra aŭdantaro. — La grupo, pri kies baldaŭa fondo ni parolis, efektive formiĝis en tiu urbo kaj havas kiel prezidanton doktoron DUFOUR, kiel sekretarion S-ron FR. LONGAUD, direktoron de la supera unuagrada lernejo.

Paris. — La 6-an de decembro, ĉe la popola universitato *La Vérité*, S-ro G. CHAVET, sekretario de la Esperantista Centra Oficejo, faris paroladon pri la demando de internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto.

Saint-Tropez. — *Prezidanto* de la grupo, S-ro MESNY, profesoro de hidrografio; *sekretario*, S-ro BONIFAY, kampokulturisto. «La 12-an de novembro, skribas ĝia prezidanto, mi faris paroladon, kiu kunvenigis pli ol 150 personojn, multe pli ol ni esperis, pli multe ol povis enteni la juĝeja ĉambrego, kiu estis al ni pruntita; kelkaj personoj devis resti en la apudaj ĉambroj. Mi poste malfermis kurson, kiu nun kunigas dek kvinon da bonaj lernantoj; en la sama tempo oni petis, ke mi faru alian al la infanoj. Tiu ĉi lasta kunigas 40 infanojn, knabinojn aŭ knabojn. Tiuj rezultoj devas esti juĝataj kiel tre kontentigaj, se oni rimarkas, ke Saint-Tropez estas urbeto da 3500 loĝantoj.»

Tours. — Du senpagaj kursoj estas farataj de S-rino GUIVY: unu por sinjorinoj (kun ĉirkaŭe 80 aŭdantinoj) la alia por sinjoroj (70-80 aŭdantoj). Pastro PELTIER, direktoro de *Espero Katolika*, faras kurson superan du fojojn en monato por niaj aliaj amikoj. (Laŭ *L'Espérantiste*)

Rusa

Odeso. — Reaperis Filio de la Societo « Espero », kies prezidanto estas elektita D-ro LUCENKO. En aron de membroj de filio eniris sufiĉe konataj agemaj geesperantistoj: V. POLJANSKIJ, BOROVKO, V. GERNET, A. KOFMAN, ĈAJKOVSKAJA kaj aliaj.

Peterburgo. — En sekvo de la nova leĝo pri la libereco de ligoj (societoj), foriganta la limigantajn regulojn pri fondiĝo kaj agado de Societoj, Ligoj kaj sim., la Komitato de la Societo « Espero » komencas la retrarigardon de la regularo de la Societo.

Pola

Radom. — Laŭ iniciato de D-ro A. NAUMAN formiĝas filio de la Societo « Espero ».

Aŭstra

Brno. — P-ro OTTO SIMON faris tre interesan paroladon pri la internaciaj mezuriloj. La parolinto uzis tiun okazon por prezenti Esperanton al la aŭdantaro kaj estis varme aplaŭdata. La gazeto *Tagesbote aus Mähren und Schlesien* raportis pri tio. Alia gazeto, *Morgenpost*, enpresis propagandan artikoleon de S-ro STEIER kaj respondas volonte la demandojn senditajn de la legintoj.

Wien. — La kurso de S-ro SCHRÖDER finiĝis; 47 lernantoj sekvis ĝin ĝis la fino. — S-ro AHLGRIMM faris tre sukcesan paroladon en la librista societo Buchfink. — Bonegajn artikolojn presigis S-ro SCHRÖDER en la gazetoj *Der Bezirksbote* kaj *Internationale Reise-Zeitung*.

Hungara

Cirkulero al ĉiuj esperantistaj stenografistoj. — Estimataj samideanoj! La Szeged'a (Hungarujo) Societo Stenografia aranĝos je la 10 aprilo 1906 ĝis la 18 aprilo *grandegan stenografian ekspozicion internacian kaj intersisteman*. Nian grandan aferon subtenegas la Reĝa Hungara Ministrejo de Instruado, la urbestro de Szeged, la Komerca kaj Industria Ĉambro de Szeged, kaj la centrala *Hungara Stenografia Societo* kun materialaj kaj spiritaj helpaĵoj.

Je tiu ĉi okazo estos ekspoziciotaj ĉiuj, ĝis nun aperintaj stenografiaj lernolibroj kaj legolibroj, gazetoj, ĵurnalaj eltiraĵoj sen sistema kaj lingva diferenco; ĉiaj presaĵoj, enhavantaj stenografian temon, cirkuleroj, oficialaj skribaĵoj, stenogramoj (aŭtografiaĵoj), originalaj manuskriptoj, ktp., ktp. Industriaj objektoj stenografiemaj, ekzemple krajonoj, stenografiaj plu-

moj, ŝutplumoj, stenografiaj kajeroj, stenografiaj bildoj, modeloj de l' monumentoj de l' famaj stenografiistoj, stenografiaj ludobjektoj; skribmaŝinoj, stenografiaj skribmaŝinoj je ĉiuj sistemoj kaj modeloj.

La grandega parto kaj fako de nia ekspozicio estos la speciala Esperantista Stenografia Ekspozicio, do ni petas niajn karegajn samideanojn, bonvolu kun speciala entuziasmo kaj sindono subtenegi nian grandegan aferon, kiu la plej bonega propagandilo estos por nia lingvo kaj nia ideo kaj la Esperantista stenografio; ni ekspozicios ankaŭ Esperantajn lernolibrojn hungarajn kaj alilingvajn.

Kun grandega respekto kaj samideana saluto ni petas niajn samideanojn, bonvolu el tiuj ĉi objektoj kaj aĵoj en viaj posedoj enestantaj *sendi* unu aŭ du ekzemplerojn je l' adreso de la prezidanto de la Stenografia Societo en *Szeged* (S-ro LUDOVIKO JAKAB, *Szeged* (Hungarujo), Fertö-utcza 4.) kaj per tio ĉi la aferon de l' stenografio kaj de nia ideo subteni. La ekspoziciotaj objektoj estos premiotaj per medalionoj kaj diplomoj.

Oni korespondas Esperante.

Nia ĵurnalo *Szegedi Gyorsiró* (Szeged'a Stenografiisto) deziras eldoni artikolojn hungare pri la Esperantaj stenografiaj sistemoj, tiujn ĉi artikolojn, esperante skribotajn, bonvolu *sendi* al S-ro Z. BARANYAI *Szeged*, Hungarujo, III. ker. polg.).

La oficiala gazeto de l' ekspozicio estas la suprenomita *Szegedi Gyorsiró*, kiu enhavos ankaŭ Esperantajn artikolojn.

Esprimante niajn plej bonegajn dankojn por viaj koregaj subtenaĵoj, jam antaŭe, ni restas kun grandega samideana respekto,

LA PREZIDANTARO DE L' SZEGED'A SOCIETO STENOGRAFIA

N.-B. — Ni treege petas niajn samideanojn, bonvolu klopodi, ke la tieaj stenografiistaj societoj partoprenus en nia ekspozicio kaj bonvolu *sendi* la nomojn de tiuj ĉi societoj.

La revuoj Esperantistaj estas petataj enpresiti tiun ĉi avizon.

Gazetaro Esperantista

Der deutsche Esperantist, januaro 1906. — J. BOREL resumas la ĉefajn progresojn faritajn de nia afero dum la jaro 1905. — Kroniko. — Avizoj diversaj. — Bibliografio. — Daŭrigo de la albumo de eminentaj esperantistoj; portretoj de S-roj de Beaufrant, Cart, Méray, Boirac, O'Connor, Drevés Uitterdyk. — O. L.

L'Espérantiste, decembro 1905. — SINDONEMULO admonas, ke oni klopodu por havi en ĉiu urbo almenaŭ unu domon, hotelon, kie vojaĝanta esperantisto povus ricevi la bezonatajn informojn. Por tio, la jenaj kondiĉoj estas plenumindaj:

1-e, unu el la servistoj sciu la lingvon ; 2-e, estu en la hotelo jarlibro, revuo esperantista, adresaro de la urbaj samideanoj ; 3-e, meti la verdan stelon kaj la vortojn « oni parolas ~ Esperanto » ĉe la pordo, sur la leterpapero, ktp. La administranto de *L'Espérantiste* aldonas, ke li estas preta helpi al tio laŭ sia eblo. — Novaj aliĝoj. — Kroniko. — Bibliografio. — S-ro J. ELLIS priskribas la aventurojn de Angloj suferantaj pro nebuloj, ĉu sur la kamparo, ĉu precipe en urboj, kie la karbofumo densigas kaj sulfurigas la nebulojn. En Londono, la nebulo estas « gustebla kaj abomene odora ». Tre sprite verkita, tiu artikolo devus tute represigi por ne perdi sian agrablaĵon. — Diversaĵoj. — M.

Espero Katolika, novembro 1905. — El la Mondo Katolika, Romo. — Religia krizo en Francujo. — En Norvegujo, la lando de libereco. — Papa sendito en Japanujo. — Konscienca libereco en Ruslando. — P-ro DOMBROWSKI plendas, ke la revuo estas *Testimonium paupertatis* ~ro sia malgrandeco. — Pastro PELTIER proponas eldoni 32-paĝan monatan revuon, kies abonkosto estos 4 frankoj jare. — Monoferoj por la Revuo. — Revuo de l'Esperantaj Revuoj. — Notetoj diversaj. — Latino-Esperanta preĝaro estos presata tuj kiam estos 250 subskribintoj ; jam estas 145. — L. M. B.

Espero Pacifista, oktobro-novembro 1905. — Parolado de S-ro EGLI, direktoro de la Lucernaj lernejoj, al kongresanoj de la Paco, vizitantaj la historian lokon « Rütli »; kie ĵuriĝis en 1307 la vorto liberiga por Svisujo. La temo estas la « Paco kaj Libereco ». Traduko farita de S-roj Schneeberger kaj Moch. — TANG-CAJ-FU, delegito de la hina societo en Parizo al la Lucerna Kongreso, plendas ke « Eŭropanoj agas kontraŭ Hinoj kvazaŭ kontraŭ venkita popolo ». Hinoj estas pacemaj kaj pretaj kunlabori kun Eŭropanoj por paca espluatado de hinaj landoj, sed ili nepre ne volas toleri la altrudaĵojn de Eŭropanoj, opion, kristianismon, atencojn kontraŭ teritoria memregeco, ktp. Traduko de G. Chavet. — Raporto pri unua ĝenerala kunveno de la Societo « Espero Pacifista » ; novaj aliĝoj, ktp. — GASTON MOCH resumas la Marokan konflikton kaj ĝeneralan politikon de Eŭropo. — L. SEGRETINAT raportas pri la Brito-Japana kontrakto, vizito de pariza urbestro al Londono, centjara festo de Trafalgar, diplomatia rompo inter Grekujo kaj Rumanujo, reĝaj vojaĝoj, ktp. — La traktatoj arbitraciaj amerikanaj. — Estonta dua Konferenco de Paco en Hago. — Granda raporto pri la 14-a kongreso universala de Paco. Aparte interesanta estas la parto rilatanta oficialan enkondukon de Esperanto en pacifistajn organizaciojn. S-ro Moch faris (kompreneble !) favoran raporton, kiu estis unuvoĉe aprobata de la komisiitaro. Sed en la Kongreso mem, kelkaj anglaj kaj amerikanaj homoj faligis la proponon. S-ro Trueblood (U. S. A.), kiu poste konfesis, ke li eĉ ne legis la raporton, proponis resendon al la Berna Oficejo ; S-ro Perris (Anglujo) kriis « finon ! finon ! » kaj estis imitata de

kelkaj samlanduloj. La propono estis resendata al la Oficejo Berna. Tiu ĉi oficejo konsistas el 26 membroj: 6 estas membroj de la esperantista Societo, 2 estas favoraj al Esperanto; 4 estas kontraŭaj (S-ro Novikov, Passy, Trueblood, S-rino Suttner); 14 havas nekonatan opinion. La duonon de tiuj 14 personoj oni devas do varbi, ĝis majo 1906. Por tio, oni organizas petskribadon internacian, kies konsisto aperos en L. I. — Decidoj de la Lucerna Kongreso. — Movado pacifista. — A. MILLERAND parolas pri la internacia protektado de la laboristoj (okaze de la Berna Konferenco). — Internaciigo de komerco. — Novaj internaciaj institutoj por polusa esplorado. — Movado Esperantista. — Ĉu vera neŭtraleco konsistas trompi ambaŭ militantojn? — Desegnaĵoj pri la francaj-germanaj rilatoj. — Militistemo ĉe civilaj regnaj oficistoj en Germanujo. — Praktika utiligado de milito ĉe Kanakoj. — Pri la puno per morto. — Libroj. — Vortaro pacifisma (antaŭdemando, suvereno, revizii). — Nekrologio. — Korespondado. — L. M. B.

Internacia Sciencia Revuo, novembro 1905. — P-ro BERTHELOT Pri nesolveblaj humikaj alkalajoj kaj ilia rolo je kampkulturo. — J. RÉVIL La formiĝo de valoj ĉe Alpoj Savujaj (fino). — A. THAUZIÈS: La orientado de la vojaĝanta kolombo. — C. BOURLET: Matematika terminaro de RAOUL BRICARD. — S. MENDES DA COSTA: Pri haŭta agado de radioj X. — P. CORRET: Higieno de l'Trinkado. — A. NIPPA Pri la embrioj de la medicinaj scioj ĉe la bestoj. — P. CORRET: Statistiko de la Morfinomano. — E. BOURNET: Nova kulturejo por pneŭmoko. — Komunikebleco de diabeto. — Kuracado de rompoj de kalkanosto. — Korespondado. — L. M. B.

Meksika Lumturo, septembro-oktobro 1905. — Hispana artikolo pri la lastaj progresoj de la propagando en Meksikujo. — M. FINOT presigas interesan monologon. — TRADUKIS raportas legendon pri la deveno de la salo en la maro. — LA REDAKCIO hispane klarigas, ke la gvidado de la propagando en la lando kaj la samtempa redaktado kaj eldonado de la gazeto fariĝis neebila; ĝi do demandas, ĉu iu volas preni sur sin la ŝarĝon de la gazeto; estus bone se la gazeto pliampleksiĝus en la hispana parto, por faciligi la propagandon kaj malhelpi la enpresadon en la gazetoj de eraroj aŭ trograndigitaj sciigoj pri Esperanto. — Kroniko, Bibliografio, ktp. — Ol. Wd.

Ruslanda Esperantisto, novembro 1905. — Kelkaj vortoj pri libereco en Rusujo. — Esperantista Organiza Komitato, cirkulero I-a. — Deklaracio pri Esperantismo. — Versaĵo tradukita de A. GRABOWSKI el pola lingvo. — SERĈANTO tradukis rakonton el ANT. ĈHOV, « dikulo kaj maldikulo ». — LEO BELMONT tradukis « El Intermezzo » de Heine. — VSEV. LOJKO tradukas du versaĵojn el LERMONTOV. — Iu raportas, ke « Enciklopedia Vortaro » de BROKHAUS kaj EFRON malŝate rilatas kun Esperanto. — MALTRANĜVILA MARISTO kritikis la mal-

veran fundamenton de la nuntempa lernejo. Manlaborado, terkulturado estas vera fundamento. Instruado daŭras jam ses monatojn ; dum la resta jaruono la studentoj laborus en diversaj fabrikoj, kiel simplaj laboristoj. Lastan jaron de universitata vivo, la studentoj vojaĝus en sia lando. — Bibliografio, Kroniko, ktp. — K. A.

Suno Hispana, decembro 1905. — Cirkuleroj de la Centra Oficejo. — LA REDAKTORO raportas, ke la ĝenerala stabestro en Valencio post unu tago da legado skribis bonegan artikolon por Esperanto « en Esperanto ». — L. MONCADA verkis rakonton, « La plej malfeliĉa el ĉiuj ». — D-ro G. PHILIPPET enpresigas tradukon de franca versaĵo el NADAL : « Sindono ». — Kroniko, Bibliografio, ktp. — Ol. Wd.

Svisa Espero, oktobro-novembro-decembro 1905. — Raporto pri la tria ĝenerala kunveno de la Svisa S. p. p. E. en Lucerno. — Kroniko, Bibliografio, diversaj avizoj, novaj membroj, ktp. — L. M. B.

Tra la Mondo, decembro. — Pri la vivado kaj verkaro de la norvega aŭtoro Björnstjerne Björnson, kelkajn vortojn diras N. OKLAND. Portreto de la poeto. — A. MONTROSIER sciigas, ke li malfermas rubrikon pri politikaj informoj. La nomitan rubrikon komencas letero de S-ro BOUŠKA, pri Prahaj okazoj ; de S-ro MARICH, pri aŭstro-hungara konflikto ; de BARCELONANO pri la katalanista movado. — S-ro SNAPE montras la portretaron kaj rememorigas pri venkoj de la Nov-Zelandaj piedpilkistoj. — Diversaĵoj, inter kiuj oni rimarkas precipe notetojn pri islanda verkisto M. Jochumsson kaj pri L. Tolstoj. — STELETO parolas pri la propaganda movado kaj pri « internaciaj enketoj », kiujn eldoni deziras T. L. M. (unua enketo : vivado en edukejoj). — Kanto-danco de S-ro R. DESHAYS. — S-ro BORD diras kelkajn vortojn pri la ŝtalfarejo « Creusot » en Francujo ; la fabrikejo estas longa je 4 kilometroj kaj okupas 15 000 laboristojn, oficistojn, ktp. panoramo de la fabrikejo. — S-ro L. CARLOS priskribas viziton, kiun li faris al la Belga reĝa instituto por blinduloj kaj surdmutuloj, sub gvidado de du esperantistoj, S-ro Vandersleyen, eks-administranto de *La Belga Sonorilo* kaj frato Isidoro, profesoro de Esperanto en la dirita instituto. La blindaj infanoj (sep-jaraj) mirinde bone parolas esperante ; 75 el 250 lernas nian lingvon. Multaj fotografajaĵoj ilustras tiun ĉi interesantan priskribon pri la vivado, edukado kaj laborado de blinduloj kaj surdmutuloj. — Fr-ino OXFENFORD originale verkis rakonton « Judith ». — Ol. Wd.

DIVERSAĴOJ

Grava propono.

En Alĝera ĵurnalo ni ĵus legis ke oni parolas inter politikistoj pri enkonduko de ia neŭtra lingvo en Marokon.

Kian belan okazon ni havas nun klopodi por Esperanto!

Alĝera Grupo havas la honoron prezenti la jenajn tri proponojn:

1-e. Ciuj eŭropaj grupoj tuj skribu esperante aŭ nacilingve al la riprezentanto de sia patrujo ĉe la Algesiras'a internacia Kunveno, petegante lin, ke li bonvolu atenti kelkajn horojn pri la Zamenhof'a lingvo, kaj pripensi pri la ebleco de ĝia introduko en la organizotan internacian Administracion en tiu lando.

2-e. Ciuj libroj plej taŭgaj por faciligi al ĉiu naciulo la lernadon de Esperanto estu sendataj al la riprezentanto de tiu nacio en la Kongreso.

3-e. Ciu sindonema esperantisto en la mondo skribu al la delegito de sia nacio, ĉu esperante ĉu nacilingve, (plej bone en ambaŭ idiomo), petante lin unue pripensi, poste klopodi por Esperanto.

Sajnas al ni ke estas dezirindege ke ĉiuj agu sen eĉ unu minuta prokrasto.

La Alĝera Grupo komencas sendi al Alĝerias'o la Ĉefeĉ'ajn vortaretojn, kaj skribas hodiaŭ mem al S-ro Revoil, iama ĝenerala guberniestro de Alĝerujo; ni konsilas al ĉiuj niaj alĝeraj anoj tuj skribi al la diversaj francaj kongresanoj.

22-a de januaro de 1906.

La Prezidanto de la Alĝera Grupo

M. AUBERT

Avizo. — La fremdaj geesperantistoj kiuj deziras viziti Parizon kaj ĝiajn kuriozaĵojn, estos certaj trovi ĉe la popola Universitato, sindonemajn kamaradojn por pli faciligi sian viziton en la granda urbo Parizo.

Sin turni por tio ĉi al kamaradoj Dauphin, Pelletier, 7, rue de Trétaigne, Paris (18^e), aŭ al Sinjoro Robert, 5, rue Ravignan, en Parizo.

Lingvo internacia. — En la bona broŝuro de nia amiko BRICARD (Matematika Krestomatio) mi trovas la literojn $[w]$ x y ; ŝajnas al mi, ke estos necese fiksi la manieron elparoli tiujn ĉi literojn; certe estus neeble eviti en matematikaj kaj ankaŭ en fizikaj verkoj la uzon de w x y .

Mi petas la diverslandajn kolegojn diri sian opinion pri tiu interesa demando.

D-ro J. HANAUER, *Frankfurt a. M.*

Pri « Dilpok » de S-ro MARCHAND. — Antaŭ ne longe mi ial ricevis folieton en lingvo franca, titolitan « Legu, komparu : Lingvo internacia de S-ro abato MARCHAND... » Komence la aŭtoro diras, ke, por montri superecon de lia metodo, estas sufiĉe citi leteron de unu eminenta profesoro de Fakultato katolika en L. (La « eminenta profesoro » preferis sin kaŝi sub literoj H. M.) ; tamen la letero nenion pruvas, nenion argumentas.

Por tute konvinki, la estimata S-ro MARCHAND skribas : jen estas specimeno de Esperanto..., la portreto de l'elpensinto mem, publikita de liaj adeptoj pro la Kongreso.

« Imagu vi malgrandan viron maldikulon, kies la gestoj estas precizaj, kaj mezuritaj la vortoj, viron samtempe timeman kaj voleman, grandan scienculon kaj prudentemulon, kaj vi konos unu el la nuntempaj famekonitaj viroj la doktoro Zamenhof, elpensinto de Esperanto. »

Do, en « Dilpok » ĝi estas « simple »

« Fause an lid man, seĉid et nervocid, presid in gest, mesid in vorts, timid et samé volman, bedoktid et sinsed, et vi keno an celebrid modern : le doktor mediker, inventar of Esperanto. »

S-ro MARCHAND proponas, ke oni komparu per tiuj specimenoj Esperanton kaj « Dilpok »'on. Mi komparis kaj ekkoleris pro indigno : la teksto estas malprecize tradukita. Por oruvtion mi persone esperantigis la saman specimenon de Dilpok :

« Imagu vi pri malgranda viro, maldika kaj nerva, preciza en gesto, modera en vortoj, timema kaj same volema, scienca kaj prudenta, kaj vi konos pri famulo moderna : la doktor' med. *), elpensinto de Esperanto. »

Mi proponas, ke S-ro MARCHAND mem pli bone komparu Esperanton kaj sian lingvon.

BORISO KOTZIN

Estas tre interese, ĉu S-ro abato MARCHAND kaj lia profesoro perfekte scias Esperanton, ĉar alie ili ne havas la rajton kritiki.

AVIZO. — Grupo esperantista ŝuvalova kies membroj estas ĉefe gestudentoj, treege interesas pri lerneja demando.

Leganto scias, ke lernejo en Rusujo travivas akran krizon. Gejunularo bruas, obstrukcas, ktp.

Ni deziras, kun helpo de niaj alilandaj gekolegoj, kiel eble pli lumigi tiun ĉi interesan demandon.

« Ruslanda Esperantisto », aminde, proponis parton de siaj paĝoj por ĉi tiu celo.

Ni presos tie niajn pensojn pri interesanta demando, kaj petas niajn tutmondajn kolegojn, ke ili ankaŭ sendu iliajn artikolojn al ni por presado.

*) En la originala teksto esperanta estas presita Doktoro Zamenhof.

Adreso por sendotaj artikoloj *St.-Peterburg, Suvalovo, Societo Espero.*

Ni pensas ke per komunaj fortoj, ni trovos sanigilon por malsana nuntempa lernejo.

Ni petas aliajn gazetojn enpresi tiun ĉi avizon.

Prezidanto de ŝuvalova filia grupo « Espero »

V. NEUPOKOIEF

Esperantujo. — En la Bulonja kongreso ekvivis nova nacio, kies anoj vivas disege en diversaj landoj nacio internacia. Kiel bele estus se tiu ĉi nacio ankaŭ posedus landon, ian sanktejon, ĉu silentan, trankvilan arbareton, ĝardenon, parkon, ĉu ian pentrindan insulon meze de lago, kaj tio propraĵo de ĉiuj Esperantistoj estus. Centoj, miloj, kaj eble unufoje milionoj da homoj pilgrimos ĉiujare en tiun ĉi teran paradizon, dankan signon kuŝigante sur la altaron homaran.

Fondu ni komitaton ; kolektu ni fundon kaj serĉu lokon eble en Svisujo, kiun oni jam nomis estontan koron de la homaro, aŭ en alia lando, kaj esperu ni, ke estos iutage sanktegejo por ĉiuj popoloj, en kiu nur estados : Espero, Paco, Amo !

Esperantujo !

— E. 8319.

Donaco por la malfeliĉuloj en Sicilio : S-ro Moskovĉenko, en Spikov, 2 fr. 30.

Kio estas Esperantismo? *What is Esperantism? Was ist Esperantismus? Qu'est-ce que l'Espérantisme?* Propaganda folio entenanta la tekston de la « Deklaracio » akceptita en la Kongreso. Difinante kvarlingve tion, kio estas Esperantismo, ĝi estas tre utila por la propagando ĉe gazetoj, societoj kaj privatuloj. 10 ekz. 0 fr. 60 ; 50 ekz. 2 fr. 50 ; 100 ekz. 4 fr. afranke. Paris, *Presa Esperantista Societo.*

Kolektoj broŝuritaj de nia gazeto Lingvo Internacia. — Ni sciigas niajn legantojn, kiuj dezirus aĉeti la **literaturan aldonon** 1905-an, ke ni povas liveri ĝin, en formo de eleganta broŝurita libro da 280 paĝoj, por la prezo de 3 frankoj (afranke 3 fr. 35).

Bindita, tiu kolekto kostas 4 frankojn (afranke 4 fr. 50).

Ni ankaŭ broŝurigas la 1905-an kolekton de la gazeto en du volumoj duonjaraj. Prezo por ĉiu duonjara volumo 3 fr. (afranke 3 fr. 35).

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Administrantaro : **Th. Cart**, prezidanto ; **Paul Fruictier**, **Ch. Vêrax**, deleg. ;

Sekretario de l'administrantaro : **V. Chaussegros.**

Teknika direktoro : **Lengyel Pál.** — Sekretario de la gazeto : **William Mann.**

S-ro LOUIS PÉRIARD, Auxerre (Yonne) Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

— S-ro GUSTAVO SCHWENGELER, en HEGI bei Oberwinterthur, Zürich (Svisujo) deziras interkorespondadi kun geesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj; ĉiam respondos.

AL ĈIU REABONANTO DE *LINGVO INTERNACIA*
provizora

B I N D I L O

!

Aldonu al la prezo de via reabono por
1906

la sumon de **1 fr. 30**

kaj vi ricevos afranke kun la venonta numero

BELETAN BINDILON

por bindi rapidege kaj praktike vian kolekton de

LINGVO INTERNACIA

ĉu tute, ĉu parte iam post iam laŭ la ricevo de la kajeroj.

Tiu bindilo vidiĝas kiel eleganta kartona koverto, kien vi pinĉas la kajerojn bindotajn.

Por tio, vi levas per la maldekstra mano unu el flankoj de l'koverto, apogante la alian sur tablo; la dorso malfermiĝas oscede, kaj per la dekstra mano vi enmetas la kajerojn.

Poste, lasu la dorson fermiĝi per si mem, kaj la kajeroj estos fiksitaj.

La papera folio, entenata en ĉiu bindilo, ne estas nepre necesega, sed ĝi plifaciligas la enmeton de l'kajeroj.

Se vi deziras ankaŭ tiel bindi la antaŭajn kolektojn de la gazeto, mendu la nombron, kiun vi bezonas, 1 fr. 30 po bindilo.

Bindilo kun elasta dorso, pli granda ol la supredirita, por paperoj el formato 21 × 27 cm. prezo por la abonantoj 1,15, afranke 1,50.

Gazetoj Esperantistaj.

L'Espérantiste, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 × 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.) ; *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) en *Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societon 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio *Louviers* (Eure) France.

Espero Katolika, revuo monata tute en Esperanto. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. Jare 2 fr. 50 (en Franclando 2 fr.) — Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

Espero Pacifista, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

Germana Esperantisto, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio Esperanto Verlag, MÖLLER & BOREL, *Berlin, S.*, 95, Prinzenstrasse.

The British Esperantist, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 Arundel Street, Strand, London.

Tra la Mondo, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komerco kaj Industrio, Militistaro, Maristaro, Teatro, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — Jare 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio 15, Boulevard des deux Gares, *Meudon* (S.-et-O.) France.

La Belga Sonorilo, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu : J. COOX, *Duffel*, Belgique

Esperanta Ligilo, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, *Paris V* — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

Esperanto, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utcza 6, *Budapest, IV*, (Hungarujo).

La Meksika Lumturo, organo de la Meksika Societo por propagandi Esperanton. Eliras 6 fojojn jare. Redaktata hispane kaj esperante. Jara abono : 3 frankoj. Administracio kaj Redakcio : D-ro A. VARGAS, *Santa Rosa Necoxtla*, (Ver.), Meksiko.

Ruslanda Esperantisto, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo : artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto ; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio ; social-politika fako ; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estas presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj multaj aliaj. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage. — Adreso : Ruslando, *St.-Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

Juna Esperantisto, monata organo tute en Esperanto. — Universala revuo por junularo. — Literaturaĵoj. — Esperantista movado. Jara abono 2 frankoj.

Disvastigo de Esperanto inter la junularo.

Le Courrier Européen, internacia ĉiusemajna gazeto, france redaktata. Traktas precipe politikon internacian, ekonomion politikan, pacifismon. — Redaktoro : R. DUMUR. Patronaro : S-ro Bjœnstjerne Bjœrnson, Novicow, Salmeron, Séailles, Seignobos, Sergi. — Jare : Francujo, 12 fr. Alilando : 15 fr. — Oficejo : *Paris*, 280, boulevard Raspail.

I. C. — Internacia Korespondado universala, fondita en 1896 de la Societo de Studoj kaj Korespondado internaciaj. 4300 membroj. 15, *rue des Grands-Augustins, Paris*. Celo : esti interisto por faciligi ĉion. — 14 sekcioj : I. Mondo kaj Vojaĝoj ; II. Naciaj lingvoj ; III. Literaturo kaj Arto ; IV. Kolektado ; V. Lernantoj ; VI. Sciencoj ; VII. Komercio kaj Industrio ; VIII. Pedagogio ; IX. Juro ; X. Ŝakoj ; XI. Psikaj Sciencoj ; XII. Esperanto ; XIII. Sportoj ; XIV. Feminismo. — Jara kotizaĵo por la tuta mondo 8 frankoj.

CH. JEANNENEY, 5, rue de Niederbronn, *Strasbourg* (Alsace), pagus altan prezon por ricevi *malnovajn Esperantajn* presaĵojn kaj gazetojn, precipe :

« *Esperantisto* », jarkblektoj 1890, 91, 92, 95, aŭ eĉ apartajn kajerojn el tiuj ĉi kolektoj,

« *Lingvo Internacia* », n-roj 11 (35) 1898 kaj 10 (46) 1899.

Hjalmar Bäckström, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

VORTAREGO

FRANCO-ESPERANTA

kunlabore redaktata de diverslandaj esperantistoj, sub kontrolo de « *Lingvo Internacia* » kaj de « *L'Espérantiste* »

Prezo : 17 frankoj. — Prospekton senpage.

La tuta verko enhavos proksimume 80 kajerojn da 16 paĝoj ! — Unu kajero da 16 p. vendita aparte : 50 centimoj, aŭfranke 55 c.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lacépède, PARIS

Plumoj, kraĵonoj, skrapgumoj « ESPERANTO » de la Boulogne'a firmo Baignol & Farjon, estas aĉeteblaj ĉe la **Presa Esperantista Societo** (*33, rue Lacépède, Paris*).

Kraĵonoj, unu peco 15 centimoj ; 12 pecoj 1 fr. 25. Plumoj, 100 por 1 fr. 50 ; skrapgumoj, 60 centimoj (unu peco, taŭgas por skribmaŝino). Aŭfranka sendo, sed oni devas aldoni prezon de poŝta rekomendo ; alimaniere ni ne garantias la alvenon.

Fotografajoj de kongresanoj en Boulogne. Tri modeloj : unu granda, montranta tricent esperantistojn, 5 frankoj. Du mezgrandaj : unu montras eliron de D-ro Zamenhof kaj S-roj Michaux, Grabowski, Boirac, k. a. el la Teatro ; la alia montras S-rojn Zamenhof, Belmont, Bein, Michaux, Lephay, Pourcines, S-inon Zamenhof, Seynaeve, Ostrovski, Ahlberg, k. a. en Wimereux ; ĉiu mezgranda po 3 fr. — *Aŭfranka sendo.*